

LEGOLIBRETO VIII.

por karaj geamikoj

kolektis

Jindřiška Drahotová

drahotova@esperanto.cz

2013

Presite en presejo Ĉistá.

Kelkfoje ĉielo estas nigra, sed la steloj estas tie. Kelkfoje frostas, sed blanka neĝo povas esti bela. Kelkfoje malvarmas, sed eblas komuniki, renkontiĝi, klopodi, aŭ preni tempon por ĝoji sole aŭ kun aliaj. Kelkfoje ekstere malagrablas, sed ofte estas domo, kie eblas ricevi varmon, lumon, ripozon, travivi amon, amikecon, feliĉon, trovi internan pacon. Tia domo estas ankaŭ en nia koro. Ha! Se ni povus resti atentemaj por gardi pozitivan vidon, ĝustan penson, por konsideri ĉiujn el niaj momentoj kiel ŝancon, dum nia nedaŭra ekzistado...

Nicole Blot, Francio

Kristnasko 2011.

Kolektanto

Ne kolektas mi ja veturilojn, nek aliajn nebezonaĵojn, ne kolektas mi ja troajn vestojn, nek skulptitajn birdojn, fiŝojn, bestojn. Ne kolektas mi la ornamaĵojn, nek diversajn tute vanajn aĵojn. Povas multon kolektadi homo. Sed en mia silentema domo staras sur mallarĝaj, etaj bretoj kelkaj plenŝtopitaj skatoletoj. Kuŝas en skatoloj la trezoroj - la leteroj de amikoj foraj, plenaj de allogaj vortoj. Ili skribas pri kaprica sorto, ke forpasis bone ĉi evento, ankaŭ pri la pluvo kaj la vento. La leteroj strangan forton havas: ili per la sincereco ravas, trafluginte la altegan limon mildan pacon portas en animon.

Mi kolektas ion tre valoran - de amikoj miaj varmon koran.

A. Apollo el Estonio.

Komuna lingvo

Marde, novembro 2011

Apáti Kovács Béla

La bestoj decidis fari ian komunan lingvon, per kiu oni povos kompreni sin, se ili renkontiĝos ie en la arbaro aŭ sur la kamparo. Ĝis nun la grava problemo estis la komunikado kaj pro la lingvaj miskomprenoj ofte okazis fatalaj tragedioj. Por eviti tiujn ĉi ĉiutagajn konfliktojn, nepre ili devas fari komunan lingvon.

La bestoj kunvenis sur arbara maldensejo kaj komenciĝis la akra diskuto. La urso ekstaris sur podion kaj ĝi komencis oratori: --Estimataj ĉeestantoj, en la arbaro regas lingva ĥaoso. La leporeto ne komprenas la vulpon, la korvo la paruon. Ankaŭ nun multaj el vi ne konas miajn vortojn. Tio estas tre


malbona. Ni devas eltrovi solvon, ke tiu ĉi problemo estu evitebla en la estonto. Kiom bone estus, se ĉiu besto komprenus unu la alian en la arbaro. Ĉesiĝus tuj la lingvaj miskomprenoj. Ni plu ne estus malamikoj. Mi esperas, ke vi komprenas kaj apogos min, por ke ni uzu komunan lingvon per kiu ĉiu besto povos komuniki.

Granda demando kies lingvo estu elektita por tiu ĉi grava celo. Tiu helplingvo devas esti sendependa kaj facile ellernebla por ĉiu.

Por ke mi helpu al vi elekti la komunikilon, mi proponas al vi elekti la mian. La ursolingvo estas vaste disvastiĝinta, belsona kaj mi garantias, vi facile povos ellerni ĝin. Espereble vi ĉiuj unuanime akceptos mian proponon kaj post kelkaj sezonoj vi parolos urse. Tiam belega epoko sekvos en la arbaro. Vi komprenos ne nur min, sed ĉiun beston. Laŭ mi neniu alia lingvo povus plenumi tiun ĉi rolon. Do, mi rekomendas al vi, tuj komencu lerni la ursolingvon. Mi kaj miaj familianoj helpos al vi en la lernado. Ni donos al vi lernilojn senpage, eĉ la eminentuloj premie povos vojaĝi al la norda poluso por renkontiĝi kun nia granda frato, la blanka urso.

Neatendite kampara museto interrompis la oracion: „Kio okazos al tiu, kiu ne deziras ellerni la ursolingvon?“

La urso kolereme alrigardis la kamparan museton kaj murmuris: „Vi estas tro malgranda. Vi ne rajtas kontraŭi mian proponon. Vi kaj aliaj malgrandaj bestoj devas akcepti la novan lingvon sen diskuto.“

La bestoj mute aŭskultis la urson, kaj neniu kuraĝis diskuti. El ili multaj konsentis, ke en la estonto la ursolingvo estu la unusola komunikilo. Kiu kontraŭis tion, tiun la timiga kaj forta urso punis. 

Edukado de edukisto

En nia familio mi estas la ununura virino kaj la plej aĝa. Mi tre klopodas mastrumi kaj teni hejmon en ordo kaj eduki sinjoraron en la sama direkto. Sed ili nuligas mian klopodon tute senpense. Plej ofte min iritas vaka skatolo de lakto staranta en glaciŝranko ŝajnige almenaŭ trione plena. Same okazas kun malplena salujo, sukero, piprujo...de kiu nekonato malplenigis la enhavon.

Tiun tagon estis dimanĉo kaj mi preparis festan tagmanĝon: supon kun hepatbuletoj kaj knedloj kun tre komplika saŭco, kiu nomiĝas en ĉeĥa lingvo, nekonate kial, „kandela“. Mi ekprenis haste skatolon por kilogramo da sukero por dolĉigi la saŭcon, pensante, ke kiel kutime ĝi estas preskaŭ malplena, sed ve! Ĝi estis plenplena kaj mia mano ne sukcesis teni ĝin. La skatolo ekflugis kaj disŝutadis sukeron tra potoj sur la forno, kiel bumerango ĝi ŝanĝis flugon ĉe glaciŝranko kaj direktiĝis al tablo kun tolaĵo preta por glati kaj reston de la sukero enmetis malantaŭ de fotelo. La skatolo stariĝis sur la fotelon kaj rigardis nin per ruĝaj okuloj, desegnitaj de la plej juna sinjoro.

De tiu tempo mi komencis dolĉigi mian kafon per kontrola sistemo laŭ pozitiva edukado de sinjoraro.

JoDo

o – o - o

Edzo solvas krucenigmon.

Edzino diras: „Karulo, lasu ĝin kaj diru al mi ion belan.“

Edzo respondis: „Kiom da literoj estos bezonataj?“

Kiel batali kontraŭ timo per aŭtomata desegnado

konsilo de Jarmila Beranová

Elektu por tiu ĉi malgranda ceremonio konvenan tempon kiam ajn plej bone matene. Koncentriĝu al via interno, kie vi sentas lokitan vian timon. Imagu al vi ĝian koloron kaj formon. Per kolorkrajono desegnu ĝin sur paperon kuraĝe kaj se estas la timo persista, uzu eĉ pluan paperon

Nun estas la timo sur papero, ne en via interno. Kion nun kun la papero plena de timo? Ne kaŝu ĝin por timigi! Ja, tion vi vere ne volas. Brulu la paperon, aŭ disŝiru ĝin je eretoj kaj forĵetu. Se ĝi estas detruita, ĝi ne havas sian forton plu. Tio estas ĉio.

Ĉu vi sentas vin pli bone, aŭ vi sentas nenion?

Do, en ambaŭ aferoj vi provu refari ceremonion almenaŭ dum sep tagoj. Certe vi rimarkos, ke vi iom post iom elektas alian koloron kaj formon de via interna timo. Tio signifas, ke la timo paliĝas, perdas forton kaj vi provas solvi la kialon de la timo.

Provu fari tiun malgrandan ceremonion unufoje en monato, aŭ antaŭ komplika ago, medicina esploro, ekzameno, grava decido...

Kun bona intenco tradukis Blanka Hužerová

Averto

Se irado estus vere saniga, kiel oni asertas, do leterportistoj estus eterne vivaj. Baleno senĉese naĝas kaj manĝas nur sane – tamen ĝi estas grasega. Leporo nur kuras kaj saltas – ĝi ne vivas pli ol kvin jarojn.

Testudo ne saltas, ne kuras, ĉiam estas la lasta, ĝi preskaŭ ne moviĝas kaj vivas 150 jarojn... **Do malrapidiĝu! Brazila – ĉefa rekomendo**



De E-Eko-Koko, Brazilo - al E-Eko-Kokino, Ĉeĥio

Objekto: Koresponda servo

Dato: 06-03-31

Kara E-Eko-Kokino, kara samideanino!

En interreto sur la paĝo www.edukado.net/korespondaservo mi trovis vian adreson kaj mi tuj skribas al vi. Permesu, ke mi unue prezentu min. Mi estas brazilano, batalkoko el glora gento kun argentinaj antaŭuloj. Miaj ungegoj estas bone akritaj kaj mia aspekto, laŭ opinioj de aliuloj, estas impona. Ĉar ĉi tie kokinoj produktas nur blankajn ovojn, mi volus, tre dezirante tion, riĉigi mian posteularon tra la mondo, precipe en la landoj, kie oni produktas kolororonamitajn ovojn. Se vi konsentus, kara Kokino, respondu al mi, kiel mi povus realigi mian amsonĝon.

De E-Eko-Kokino, Ĉeĥio

Al E-Eko-Koko, Brazilo

Objekto: re

Dato: 06-03-31

Kara, bela, nekonata Koko, samideano, mi estas per via mesaĝo ravita. Sed nuntempe okaze de birda malsano estas kontaktoj severe kontrolataj kaj oni ne permesas vojaĝi. Sed nia kokinejo estas bone science ekipita kaj artefaritaj kontaktoj havas altan sciencan nivelon. Sufiĉos, se vi sendu amormaterialon bone frostitan aviadile. Kaze de favora efiko mi sendos foton de la ovo al vi en venontaj mesaĝoj.

Konkursa verketo, AEH Pardubice, J.Drahotová

Ne forpelu vagantajn hundetojn

Por via rideto tradukis Esperanten
je la 3a de Aprilo 2011 , Jarmila Rýznarová, Pardubice, Ĉeĥio

Maljuna, tre lace aspektanta hundo antaŭ nelonge venis en mian korton. Ĝi estis bone nutrita kaj laŭ la bela kolrimeno kaj pureco de la felo estis evidente, ke oni bone zorgas pri ĝi. Ĝi amike skuis la voston kaj kun stulta rideto, kiujn scipovas nur hundoj, ĝi venis humile al mi kaj mi povis ĝin karesi sur la kapo. Ĝi estis feliĉa, ke mi ne rifuzis ĝin kaj sekvis min hejmen.

La hundo paŝis malrapide tra la koridoro nur flarante al proponita frandaĵo; ĝi ekkuŝis sur la tapiŝon en la angulo kaj post momento ĝi ekdormis. Post horeto de dormo ĝi ekstaris, denove amike vostumis kaj iris al la pordo, kiun mi malfermis por ĝi. Pluan tagon ĝi revenis, denove salutis min en la korto, eniris en la saman lokon en la angulo kaj denove proksimume unu horon dormis. Tio ripetiĝis dum kelkaj semajnoj...

Scivolema mi skribis mesaĝon sur peceto de papero, kiun mi alfiksis sur ĝian kolrimenon: „Volonte mi scius, kiu estas la posedanto de tiu ĉi belega kaj kara hundo kaj ĉu vi scias, ke preskaŭ ĉiam antaŭtagmeze ĝi venas en mian domon kaj unu horon ĉi tie dormas?“

La sekvantan tagon la hundo denove venis dormi kun la respondo alfiksita sur la kolrimeno: „Ĝi nomiĝas Bela kaj ĝi vivas en brua hejmo kun ses infanoj; du infanoj ankoraŭ ne estas trijaraĝaj ..., ĝi klopodas nur ripozi kaj dormi. Ĉu ankaŭ mi povus morgaŭ veni kun ĝi?“

Detranĉitaj floroj

Nevŝedko je la 5-a. majo 2012,
slovakia interreto



Niaj antaŭuloj sciis, ke floroj, detranĉitaj, klopodas plu vivi sen radikoj kaj ankaŭ suĉas vivenergien el sia ĉirkaŭaĵo, do eĉ el homoj, bestoj kaj aliaj herboj. Pro tio eĉ sanigajn herbojn oni ne sekigis en ĉambroj, kie vivis homoj.

Aŭguristino Vanga el Bulgario rifuzis akcepti homon, kiu alportis por ŝi bukodon kun vortoj: „Kial vi alportas al mia domo morton?“ Se iu deziras donaci florojn, do en florpoto kun argilo. Vanga diris: „Detranĉita floro estas simbolo de morto, ĉar ĝi plu ne povas vivi.“

Sur la insulo Kubo, ekzemple, oni povas vidi detranĉitajn florojn nur sur tomboj en tombejo kaj polico povas puni pro detranĉo de floroj.

La tradicio donaci detranĉitajn florojn venis al ni kun kristanismo. Ĉefe bizancaj pastroj trudis al slavo la tradicion ornami ĉambrojn per detranĉitaj floroj. Donaci florojn ne estis slava kutimo, pri tio atestas historiaj skribaj fontoj.

La kutimo donaci florojn oni krom alie, kunigas kun festo de naskiĝtago, kun kiu kutime apartenas torto kun brulantaj kandeloj.. La kutimo blovestingi ilin estis ankaŭ al ni fremda. La kandelo blovestingita forprenas de la festulo parton de vivforto! Ĉar brulanta kandelo estas simbolo de vivoflamo kaj diraĵo „Ĝis via kandelo estingos...“ signifas ...morton ... foriron el vivo.

Lokustoj en supo

Bruno Ferraro – „Příběhy pro potěchu duše“

(Okazaĵoj por kvietigi animon)

En iu groto en dezerto vivis grupo da monaĥoj. Unu el ili estis juna kaj konatigadis kun la vivo de monaĥoj. Iam li venis al maljuna saĝa monaĥo.


„Patro“, li alparolis lin, „vi scias, ke estos jam unu jaro, kiam mi vivas en tiu ĉi dezerto. Kaj dum tiu tempo sesfoje aŭ sepfoje alflugis lokustoj. Vi scias, kia katastrofo, ĉar lokustoj algrimpas en niajn manĝojn. Kiel vi povas tion elteni?“

Maljuna viro, kiu vivis en dezerto jam kvardek jarojn, respondis lin jene: „Unue, kiam unua lokusto alflugis en supon, mi forverŝis ĉion. Kiam pasis ia tempo, mi elmetis dum flugatako de lokustoj ĉiujn lokustojn, kiuj falis en supon kaj mi formanĝis supon. Pli malfrue mi manĝis supon eĉ lokustojn. Nuntempe, kiam unu lokusto klopodas foriri el la supo, mi almetas ĝin en la supon reen.“

Instruo

Dum tempo la homo al kutimiĝas ĉion, dediĉas sin al kvieto kaj eĉ al tio, kio estas malagrable en sia esenco. Iu eĉ komencas respekti siajn erarojn.

Elĉeĥiĝis Blanka Hužerová



La 100-kilometra ponto

Super markolo oni konstruis 100-kilometran ponton. Ĝia ŝarĝeblo estas 40 tunoj (t.e.: ĝi povas elporti ekzakte 40 tunojn; eĉ unu sola plia gramo faligus ĝin). Giganta dizelmotora kamionego “TIR”, pezanta ekzakte 40 tunojn, suriras la ponton. Neniu alia veturilo troviĝas sur ĝi, nek suriras la ponton dum la irado de la kamiono.

Post 50 kilometroj iu pasero, pezanta 25 gramojn, eksidiĝas sur la kamiona stir-kajuto. Kio okazos?

Enigmo de Sen Rodin (Italio)

Helena filozofo

Helena filozofo promenis kun siaj studentoj ĉe maro. Studentoj demandis lin, kial li tiel ofte dubas pri siaj respondoj. La filozofo desegnis sur sablon cirklon kaj diris: „Tio estas viaj scioj kaj perimetro estas via nescio.“

Poste li desegnis pli grandan cirklon kaj diris: „Tio estas miaj scioj, vidu la perimetro estas pli granda, tial mi ofte dubas.“

Marie Žižalová, Benešov, Ĉeĥio dum seminario en Skokovy.

La solvo: Nenio, parto de dizelpetrolo vaporiĝis, la pezo de ŝarĝaŭto ne estos danĝera.

Mara mevo „Pepeto“

Blanka Hužerová, Ĉeĥio

En unu familio de maraj mevoj naskiĝis belega birdeto kaj la birdeto estis tre atentema kaj tre scivola. Li estis tre ŝatata en sia familio kaj ĉar li kantis per belega maldika voĉo oni nomis lin „Pepeto“. Ĉar la familia nesto estis post aliro de la nova ano malgranda, oni decidis translokiĝi pli malproksimen laŭlonge de la kroatia bordo kaj trovis rokon proksime la somerloko Kanegra.

Malgranda birdeto „Pepeto“ kreskis, lernis kun panjo flugi kaj naĝi en marondoj, kiuj kantis al li belegajn lulkantojn.

La patrino mevino atentigis lin : „Ne iru al strando, ĉiuj homoj ne estas same bonaj, tie estas multe da infanoj kaj hundoj, ili povus vin vundigi.“

La Pepeto estis lernanta kaj atentema en akvo, same en aero. Proksimiĝis lia festotago – memstara flugo el familia roko en la mondon inter homoj. Oni difinis sekvan tagon. Nia Pepeto estis la birdeto plenai de ideoj kaj li pensis kaj pensis kaj diris al si mem, mi scias ĉion, mi estas preparita, mi iros al mondo pli frue kaj mi surprizos miajn gepatrojn.

Kaj matene, kiam lia patro kaj patrino ankoraŭ dormis, nia birdeto ekflugis por sia unua vojaĝo – super bordo antaŭ la sunleviĝo. Li flugis, flugis kaj ekvidis homojn en la strando. Ili ekzercis kaj kantis kanton por invito de suno. Ili imitis parolon de mevoj. Poste ili sidiĝis ĉiuj sub la pinon kaj granda „mevo“ – ilia gvidanto - legis al ili rakonton pri frato pasero kaj ĉiuj bele ridetis unu al la alia. Tiuj homoj ne vundos min, pensis nia mevo kaj flugis

rapide hejmen al siaj gepatroj. Ĉiuj el roko aŭdis kriadon de malgrandeta Pepeto: „Panjo, panjo – mi vidis homojn, amikojn, ili parolis per nia lingvo, ili kantis, sed ili ne scipovis flugi eĉ kiam ili svingis per siajflugiloj.”

Sed la patrino koleris al li : „Mia birdeto, kial vi min ne obeis kaj flugis pli frue ol vi promesis al mi? Ni volis flugi kune. Vi povus vundi vin, mi tre timis pri vi, kiam mi ne vidis vin en liteto. Eble vi havas febron, hieraŭ estis varmo. Mi tuŝos vian beketon. Kion vi parolas? Kiu povas tion kredi?”

„Sed panjo! Mi petas pardonon, estonte mi obeos vin, sed mi estis tre senpacienca kaj tre scivola. Ĉar vi ne kredas al mi, mi proponas – flugu kun mi, eble vi vidos ankaŭ tiujn interesajn homojn frue matene.”

Kaj tiel okazis! Sekvan tagon ekflugis frue matene al strando nia mevo Pepeto kaj post li tuta familio de mevoj. Nia mevo trankvile ekiris inter kuŝantaj homoj kaj al panjo flustris: „Ĉu vi kredas fine al mi?“ Subite alflugis nubo plena de mevoj, tio estis scivolaj amikoj, alvenis kaj alsaltis ankaŭ fratinoj sciuroj kaj ĉiuj komencis paroli, babili . Tio interesis ankaŭ homojn sur la strando, ili ĉesis ekzerci, salutis birdetojn kun parolo de mevoj kaj amike svingis al ili. Mevoj kreis belegan birdetan nubon kaj flugis malproksimen en vastan maron. Ili vidis konatan ŝipeton kiu matene alveturadis kun nutraĵo por birdetaj beketoj kaj birdetoj povis plenumi sian belan taskon – akompani ŝipeton de homoj, kiuj venis al pikniko. Homoj akompanis birdetojn kun ridetoj.

Kiel estus belege en la mondo, se ĉiuj homoj ŝanĝiĝus en belajn mevojn kaj povus kune flugi per ondoj de vivo kaj kune protekti nian patrinon – Teron. Nia planedo havas tre multe da argumentoj koleri kontraŭ siaj loĝantoj, sed ĝi pardonas al ni konstante kaj ĝi proponas multe da belegoj ĉirkaŭ ni.

o – o – o

Pri spiritualeco

El la libro „Modlitba žáby“ - de Anthony de Mello S.J.

Antikva filozofa Sokrates kredis, ke por homo estas nature vivi modeste. Li mem ne portis ŝuojn, sed li refoje ŝate vizitadis bazaron kaj rigardis varojn.

Iam demandis lin unu el konatoj, kial li tiel ofte vizitas bazaron kaj Sokrates respondis : „Mi ŝatas iri tien por malkovri sen kiom da aĵoj mi estas tute feliĉa.“

La spirualeco ne estas en tio, ke ni scias kion ni volas, sed ke ni ekkomprenas, kion ni ne bezonas

Esperantisto

Dimanĉo junio 2012
Béla Kovacs, Hungario

Hieraŭ mi renkontiĝis kun esperantisto. En la unua momento li aspektis, kiel ĉiu homo. Li havis manojn, kruojn, ankaŭ lia kapo estis ĉiutaga. Neniu strangaĵo estis, kiu perfidus lian esperantistecon. Multaj homoj certe ne kredus tion. Oni pensas, ke esperantisto estas strangulo, kiel NIFO-ano aŭ io simila. Sed tiu ĉi esperantisto vivas sur la olda tergloba kaj ĉiutage li iras al sia laborejo, li tagmanĝas en la proksima restoracio kaj mi certas, ke matene li legas gazeton kaj vespere en amika rondeto trinkas kruĉon da biero.

Tamen estas io, kio diras: li estas esperantisto. Tio io loĝas en la koro kaj ĝi pelas lin disvastigi la movadon. Se li ekvidas la flagon de esperantistoj, tiu ĉi ulo tuj eksaltas kaj komencas oratori pri la interna ideo.

Ĉu tio estas bona?

Eble. Ĉar esperantisto estas pacema homo. Li volas mondpacon, fratecon kun ĉiu homo, estu li nigrulo, flavulo aŭ blankulo. (Ni ne forgesu esperantistoj estas verduloj!)

Ĉiu esperantisto estas bonintenca homo kaj lin ne interesas, se li estas primokata. Ofte mi aŭdis moka rimarkon kaj poste cinikan ridon: li estas esperantisto. Alia tuj ridaĉas kaj diras: El kiu planedo li alvenis?

Ĉu vere esperantisto estas ridinda homspeco? Kial oni pensas pri li tion?

Laŭ mi, esperantisto ne estas la pasinto, li estas eĉ la estonto, kiu montras al ni la sekvindan vojon.

Kiel klarvida estis Sokrates:

Demokratio falos pro klopodo plenumi postulojn de ĉiuj. Malriĉuloj volos havi parton de posedaĵo de riĉuloj kaj demokratio donos tion al ili.

Junuloj postulos rajtojn de maljunuloj, virinoj rajtojn de viroj, fremduloj postulos rajtojn de civitanoj kaj demokratio donos al ili tion.

Krimuloj strebos pri postenoj de publikaj „servoj“ kaj demokratio konsentos, ĝis krimuloj ekregos demokration, ĉar ili ĉiam strebas pri povo, ekestos tiranio pli malbona kaj terura ol la plej malbona monarkio aŭ oligarkio.

La Nigra Katido

Keyhan Sayadpour, سەتان 1391, Somero 2012

Estis agrabla printempa vespero. Amanto kaj amatino promenis sur strateto manĝante sandviĉon.

“Fi! Kiom malbela estas tiu nigra katido!” kriis la amatino.

“Sed laŭ mi ĝi estas karesinda besto. Mi ŝatas katidojn.” kontraŭis la amanto.

“Male mi malŝatas ĉiujn nigrajn vivulojn, speciale katojn. Vi ne rajtas ĵeti por ĝi el via sandviĉo. Ĝi sekvos nin se vi tion faros.”

La nigra katido miaŭetis kaj rigardis ilin, kiuj estis malproksimiĝantaj. Ĝi naskiĝis antaŭ kelkaj tagoj kaj ĝia patrino, same tute nigra, lasis ĝin sola kaj iris trovi manĝaĵojn. Ĝi tre malĝojiĝis, kiam vidis ĝian koloron naskinte sian bebon. Kiel nigra katino ĝi havos multe da problemoj. Unue, preskaŭ neniu homo ĵetas manĝaĵon por nigra kato. Aldone, alikoloraj katoj ankaŭ ne ŝatas nigrajn katojn. Estas malfacile por ĝi trovi sekskunulon. En la kvartalo kie ĝi vivas, ne ekzistas nigra virkato kaj nenigraj virkatoj apenaŭ emas seksumi kun nigra katino!

“Miaŭ! Ĉu via patrino mortis aŭ ĝi estas nenigra kaj ĝi forlasis vin por ĉiam?” demandis griza preterpasanta kato.

“Ne! Ĝi iris trovi manĝaĵojn. Ĝi estas nigra ankaŭ,” respondis la nigra katido.

Estis frua mateno. Ŝoforo hastis, ĉar iom malfruiĝis kaj li devis preni ĉiujn lernantojn kaj alporti ilin ĝustatempe al la lernejo. Subite la akra sono de forta bremsado vekis ĉiujn loĝantojn de la strateto. La ŝoforo, ankoraŭ ne bone vekita, ne vidis nian nigran katidon trapasintan la strateton kaj mortigis ĝin sub la radoj de sia aŭto. Li ne haltis ĉar li ne deziris, ke la lernantoj vidu la tragedian scenon. La nigra katido komforte dormis eterne sur la asfalto de la strateto kaj ne spertis la malfacilaĵojn de nigraj katoj.



El la libreto „Bajky, skorobajky, vzdorobajky“

Jiří Hugo Žáček

- Pri korniko, vulpo kaj fromaĝo

Sur alta branĉo sidis korniko kaj en la beko ŝi havis pecon da fromaĝo. Kompreneble tuj aperis la vulpo. Ankaŭ ŝi ŝatis fromaĝon kaj komencis ruzi.

„Bonan matenon, sinjorino kornikino! Vi estas la plej bela inter ĉiuj birdoj! Kaj onidire via voĉo estas belege bela...“

La korniko prenis la fromaĝon en kruron kaj kornike ekkriaĉis: „Haltu kanajlino! Ĉu vi pensas ke mi estas senile idiota? Kaj ke mi parkere ne lernis en lernejo malnovan fablon pri stulta korniko? La fromaĝon mi ne donos, sed vi povas rigardi, kiel ĝi al mi bongustas!“

Kaj ŝi plu manĝis.

Ĝis la korniko la fromaĝon formanĝos, eble eĉ stultuloj ekkonos, kiel por la vivo estas grava edukado. (ekzemple: www.edukado.net)

- Pri logiko

„Damne, tiuj muŝoj!“ koleris bovino. „Kial estas en la mondo insektoj?“

„Ĉio havas sian kialon,“ diris hirundo, kiu manĝis muŝojn. „Muŝoj ekzistas por ni, por hirundoj, por ke ni povu vivteni nin!“

„Nu, bone,“ klinis kapon la bovino kaj ekmeditis: „Sed por kio estas en mondo utilaj hirundoj?“



- Vivu la paco !

Nigraj kaj flavaj formikoj vivis longtempe pace, ĝis iu saĝulo, hazarde el gento de nigraj formikoj, kaptis ideon: „Per nudaj manoj ni pacon ne tenos. Kiu volas daŭrigi pacon, devas havi armilojn!“

Ĉiuj samgentanoj konsentis kaj nigraj formikoj armis nombrajn anojn. Certe ne por milito, sed por teni pacon.

Spionoj de flavaj formikoj baldaŭ trovis, ke najbaroj armiĝas kaj flavaj estroj decidis: „La pacon ni devas savi, eĉ se ni militus!“

Kaj flavaj ankaŭ starigis fortan armeon.

Generaloj de ambaŭ armeoj solene deklaris: „En batalo por paco ni estas pretaj al maksimumaj viktimoj. Paco al mondo!“

Estis klare, ke batalo por paco ne estos promeno en roza ĝardeno. Kaj ĝi vere ne estis. En kruela milito mortis multaj heroaj batalantoj, ĝis per komunaj fortoj oni sukcesis la pacon savi.

Sed, kiam estas en ambaŭ flankoj sufiĉe da bona volo, bona afero finfine sukcesos.

Vivu la paco!



- Renkontiĝis du ratoj

Renkontiĝis du ratoj. Unu estis maljuna veterano, estro de subtera regno, la dua estis juna, sensperta, sed plena de entuziasmo.

„Estro“, komencis la juna, „ni eku militon kontraŭ homoj! Ili vivas en luksaj palacoj kaj ni vegetas en malpurakvaj kanaloj! Ni venkos! Ni ekstermos ilin! La mondo apartenas al ni!“

„Knabo,“ gratis sian barbon la rata estro, „via militemo estas laŭdinda, sed pensu! Se ni ekstermus la homojn, kiu vivtenus nin? Malmemoru militon, ĉio restos tiel, kiel estas!“

Kaj tiel eĉ restis, ĉar ratoj ne estas stultuloj kaj laboron lasas al la homoj. Ja, ĉar ni homoj devas labori por vivteni nin kaj la ratojn.

- Pri la urso, kiu konis la plej bonan respondon.

La urso enlitiĝis por vintra dormo, sed li ne povis ekdormi. Do li por mallongigi la tempon legis en saĝaj libroj, ĝis la porcioj de saĝaĵoj lin dormigis. Kiam li printempe vekigis kaj elrampis el kuŝejo, li diris al si mem: „La plej bona respondo al ĉiu demando estas JES! Ridetu al mondo kaj la mondo ridetos al vi! Vivu, nova vivo!“

La urso promenis tra arbaro, ridetis al ĉiuj, ĉiujn ĝentile salutis, pribabilis veteron, ĉiujn laŭdis kiel ili bele aspektas kaj kiajn belajn estas iliaj idoj kaj kiam aldonis gajan anekdoton, ĉiuj miris, kiel la maljuna grumblanto ŝanĝiĝis, kiel li estas ĝentila, kian delikatan stilon li uzas, kiel li noble kondutas. Kaj la urso ĉiam aldonis: „Geamikoj, la plej bona respondo je ĉiu demando estas: jes!“

Ĝis du petolemaj leporoj inter si diris: „La urso senilas! Ĉu ni primoku lin?“

Kaj ili postkuradis la urson kaj komencis lin ĝeni: „Urso, ĉu estas vero, ke vi estas la plej granda stultulo en la mondo?“

„Jes,“ murmuris la urso, ĉar li ne volis nuligi siajn principojn.

„Kaj ke vi havas en kapo anstataŭ cerbo la kaprajn fekaĵojn?“

„Jes,“ dentogrincis la urso.

„Kaj ke vi ĝojos, kiam ni vin vangofrapos?“

„Jes,“ ekhurlis la urso kaj ruzaj leporoj vangofrapis lin post oreloj.

Tio estis tro! La bonulo ne eltenis kaj ekkriegis: „Nun mi mem respondos kelkajn demandojn: Ĉu la oreloj estas tro impertinentaj? Jes! Ĉu ili pensas, ke estas senpunaj? Jes! Sed ili eraras, ĉu? Jes!“

Kaj la urso batis unu leporon per „bekhendo“ kaj la duan per „forhendo“ per ursa forto.

Konsilo: La plej bona respondo estas „jes“, precipe, kiam vi povas aldoni ĝustan ursan frapon.



- Pri hundeto kaj katineto

Hundeto kaj katineto vivis kune bone kaj kontente. Iun tagon diris unu al la alia: Ni devus finfine legi, kion pri ni verkis sinjoro verkisto Karel Čapek en la libro.“

Do ili legis kaj legis, ĝis la rakontadon finlegis.

„Li tion skribis tre bele,“ laŭdis la hundeto.

„Eĉ tro,“ diris la katineto, „sed plenan veron li ne skribis. Li devus priskribi, kiel vi grumbas al mi, kiam vi revenas el via vira klubo!“

„Kaj vi, ke vi kalumnias min inter ĉiuj katinoj,“ ne eltenis la hundeto, „ke mi ne ŝatas min lavi kaj ke mi malodoras!“

„Kaj ke vi kutimas fumi en lito kaj ofte bruligas kovrilon!“

„Kaj ke vi estas kverelema kiel via patrino!“

Nun ambaŭ ofendisunu la alian.

Nur post iu tempo la katineto diris: „Hundeto, estas pli bone, ke sinjoro Ĉapek priskribis nur tion pli belan. Li sciis, ke tio bona estas pli grava. Se li skribus pri ni la tutan veron, ni estus por homoj malbona ekzemplo.“

„Vi estas la plej bona kaj la plej saĝa katineto en la tuta mondo,“ laŭdis ŝin la hundeto. Li kisis ŝin kaj foriris al regula vira klubo.

Sed tion ni al infanoj ne diros, ĉar malbonaj ekzemploj troviĝas ĉie.

Tradukoj JoDo.

Patro kaj filo

Patro kaj filo ekskursis en montaro. Post unu jaro ili marŝis laŭ la sama vojo. La filo diris al la patro: „Mi konstatas, ke vi estas pli malforta ol la lastan jaron kaj mi estas pli forta kaj vigla, ol vi.“

La patro ne respondis, nur iom malgajiĝis.

Fakte la tempo faras senhalte sian taskon, sed patro estos ĉiam pli saĝa ol filo, ĉar maljuna homo kolektis pli da spertoj, ol la pli juna.

Hiacinto kaj Mohamedo

Dimitar Haĝiev el HEROLDO 4/2009

Je la 8-a de marto – laŭ tradicio – viroj prezentas florojn al virinoj. En la bazaro, por tiu ĉi tago, ĉiam haveblas granda elekto de floroj.

Mia ŝatata kaj preferata floro estas la hiacinto pro ties intensa kaj agrabla aromo. Ĝia latina nomo estas *hyacinthus*. Ĝia nomo devenas de la mita junulo Hiacinto, filo de Klio, muzo el antikva historio. Pri la patro estas diversaj variantoj. Hiacinto estis eksterordinare bela knabo kaj favorato de Apolono - dio de la suno, poezio kaj artoj. Ankaŭ la dio de la okcidenta vento - Zefiro, ege ŝatis lin kaj iun tagon, kiam Apolono estis trejnanta lin ĵeti diskojn, Zefiro en eksplodo de ĵaluzo turnis abrupte la ĵetatan diskon kaj vundis ĝismorte Hiacinton.

Apolono provis ĉion por savi lin, sed ne sukcesis, kaj direktante siajn radiojn sur la sangajn gutojn, li transformis ilin en parfuman floron. En Grekio pro tio oni nomis la hiacinton *floro de la malĝojo*. En la moderna greka lingvo, tamen, same kiel en la ceteraj balkanaj lingvoj, estas uzataj variantoj de la pruntaĵo *sunbul* el la persa lingvo tra la turka. En la ceteraj eŭropaj lingvoj estas uzataj variantoj de la latina nomo.

La patrujo de la floro estas la landoj preter Kaspio. En la araba mondo la hiacinto estas eksterordinare respektata kaj ŝatata floro. Al la profeto Mohamedo estas atribuata la eldiraĵo: *Se mi havus du panpecojn, mi vendus unu por aĉeti hiacinton, por nutri mian animon*.

Nur antaŭ ĉirkaŭ tri jarcentoj la hiacinto estis transportita al la landojn de Okcidenta Eŭropo kaj ĝi fariĝis tre populara kaj ŝatata. La plej malnovaj kaj preferataj estas la nederlandaj hibridoj.

Mireille aĉis je 2012-10-29

Tiu artikolo aperis de Mirenjo en la gazeto LA SAGO en junio 2011

Mi tute ne ŝatas la francan esprimon « langue maternelle » (patrina lingvo). Aŭdante tion oni povas imagi, ke bebo ne komunikas kun sia patro ! En esperanto jam estas pli taŭga esprimo : denaska lingvo, do temas pri tiu lingvo, kiun bebo aŭdas tuj post sia naskiĝo. Tamen povas okazi, ke bebo aŭdas plurajn lingvojn. Do kiel priskribi tion ?

Rigardu manon !

Unu fingro montras la lingvon de la patrino. Eble ŝi unue ekrilatas kun la bebo dum mamnutrado. Alia fingro montras la lingvon de la patro. Same li rilatas al la bebo, parolas al li/ ŝi, komunikas, kantas, rakontas. Povas esti, ke la gepatroj ne havas la saman denaskan lingvon, sed havas iun alian komunan lingvon. Tio estas la tria fingro, la gepatra lingvo aŭ la familia lingvo. La kvara lingvo estas la loka lingvo, la lingvo, kiun la infano aŭdos en la lernejo ; instrulingvo aŭ kultura lingvo. Kaj la polekso ? Ĝi reprezentas miajn ideojn, kiuj promenadas nudaj en mia kapo. Mi devas vesti ilin per iu lingvo (promeni nuda ne decas...), se mi volas alparoli iun, komuniki ion al iu. Do mi elektu lingvon konatan de mia aliulo. Ĉe mi persone mia familio « duŝis » min per unu nura lingvo: la franca. Sed mia lernantino el Zuriko Julia uzas diversajn lingvojn; ŝia denaska lingvo estas la germana. Ŝi studis la italan en Italio kaj tie konatiĝis kun japano. Ili enamiĝis, geedziĝis kaj parolas kune la italan. Se ili loĝus en Santiago de Ĉilio, la kvara lingvo, loka lingvo, estus la hispana. En tiaj familioj evidente la infanoj estas poliglotoj.

Laŭ Goethe : „ Die Grenzen meiner Sprachen sind die Grenzen meiner Welt.“ La limoj de miaj lingvoj estas la limoj de mia mondo. Do havu grandan lingvan kolekton kaj via mondo estos pli granda.

Dum kongreso pri lingvoj mi alparolis la publikon dirant : „Nuntempe la normo estas unulingveco. Tamen afrikanoj ekzemple estas ĉiuj plurlingvanoj. Tio povus fariĝi la normo. Kiam tio okazos, unulingvuloj estos handikapitoj !!“ Tiu frazo estis ŝoko por pluraj personoj en la publiko de unulingvanoj.

o – o – o

Sendependaj kaj justaj tribunaloj

El nia lando 2012- en anekdoto

En iu urbo estis vokita kiel atestanto maljuna virino. Kiam ŝi proklamis, ke ŝi parolos nur veron, advokato de la akuzito demandis:
„Sinjorino, ĉu vi konas min?“

„Jes, mi konas vin jam de tempo, kiam vi estis bebo. Kaj por diri veron, vi estas por mi granda aflikto. Vi mensogas, kokras, manipulas per homoj, kaj kalumnias ilin. Vi pensas pri si, ke vi estas ia granda besto, sed vi ne estas tiel inteligenta, vi restos nur juristo en nia malgranda urbeto.“

La advokato perpleksis, liaj okuloj grandiĝis. Sed la ŝokon li rapide superis kaj demandis denove la atestanton: „Sinjorino, ĉu vi konas juriston de la plendanto?“

„Jes, mi konas lin jam de tempo, kiam li ankoraŭ ne paŝis. Mi de tempo al tempo vartis lin. Ankaŭ li estas por mi aflikto. Li estas pigrulo, denuncanto kaj ebrulo. Li nekapblas dece trakti kun homoj kaj liaj fakaj spertoj estas nesufiĉaj kaj sen koruptaĵo li nekapblas ion ajn solvi.“

En tiu momento la juĝisto batis per marteletoj kaj ordonis paŭzon pro konsilo. Li vokis ambaŭ juristojn kaj diris: „Sinjoroj, se iu el vi demandos la sinjorinon, ĉu ŝi konas min, mi punos vin pro malrespekto al la tribunalo!“

Vera demokrati-fantazio

Siv Burell, Svedio, 28-a de januaro 2013

Sportpsikologo diris al la konkursantoj:

"Pensu pozitive ĉiam,
ne estu kriemulantoj
sed imagu unu venkon iam!"

Sur premia tribunon ili staras
tre riĉaj sentas sin.
Sed diru min, ĉu ne avaras
la aliaj, kiuj ankaŭ streĉis sin?

Pli vastan tribunon oni devas fari
por ke ĈIUJ povas tie stari!

Pri raneto

Martin Thorenz

Iun tagon malina inĝenierfaka studento transiris straton kiam rano alvokis lin dirante: „Se vi kisos min, mi transformiĝos en belan princinon.”

La studento kliniĝis, levis la ranon kaj metis ĝin en sian poŝon. La rano ekparolis denove dirante: „Se vi kisos min, mi transformiĝos en belan princinon kaj mi restos kun vi dum tuta semajno.”

La inĝenierfaka studento elprenis la ranon el sia poŝo, ridetis al ĝi kaj remetis ĝin poste reen en la poŝon. La rano ekkriis: „Se vi kisos min kaj retransformigos min en princinon, mi restos kun vi kaj faros ĈION kion vi volas.”

Denove la junulo elprenis la ranon, ridetis al ĝi kaj remetis ĝin en la poŝon. Finfine la rano demandis: „Kio estas? Mi rakontis al vi, ke mi estas bela princino, ke mi restos kun vi dum tuta semajno kaj ke mi faros ĉion kion vi volas. Kial vi ne volas kisi min?” La junulo diris: „Rigardu, mi estas inĝeniero. Mi ne havas tempon por koramikino, sed parolanta rano estas mojosa.”

Prenite el interreto

Du ŝtelistoj en malliberejo

„Ĉu vi jam vidis novan horloĝon de nia juna gardisto?”

„Ne, montru al mi.”

Du paseroj

Blanka Hužerová, Ĉeĥio

Du paseroj feliĉe trovis kaŝlokon en unu arbo. La arbo estis saliko. Unu el paseroj nestis en supro de la saliko, dum la alia trovis loketon malsupre tie, kie la arbo komencis disbranĉi. Post iu tempo la supra pasero volis amikiĝi. Li komencis paroli: „Ĉimĉim, la folioj de la saliko estas bele verdaj.“

La pasero el malsupro konsideris tion kiel provokaĵo. Li respondis sekece. „Ĉu vi estas blinda? Ĉu vi ne vidas, ke la folioj estas blankaj?“

La supra pasero koleriĝis: „Vi mem estas blinda! Ili estas verdaj.“

La malsupra pasero kun beko supren ekscite parolis: „Mi vetas miajn plumojn el vosto, ke la folioj estas blankaj. Vi komprenas nenion, vi estas frenezulo.“

La pasero el la supro sentis, kiel la sango komencas en li boli, li ne pripensis kaj li flugis malsupren. La dua pasero ne ŝatis tion kaj ili eksaltis unu kontraŭ la alia, la plumoj sur kolo al ili hirtiĝis. Tuj ili volis bati sin, sed ili levis siajn kapetojn kaj rigardis supren, por subteni sian veron.

La pasero, kiu flugis tien el supro, elspiris kun surprizo, „Ĉimĉim, mi vidas, la folioj estas vere blankaj.“

Li turnis sin al sia rivalo kaj proponis: „Venu intence rigardi la foliojn supren, de kie mi mem rigardis.“

Ili flugis al la supro de la saliko kaj ili parolis kune per birda parolo: „Rigardu, la folioj estas vere verdaj.“

Kondamnu neniun, ĝis vi ne rekonas angulon de lia rigardo.

o-O-o

Kion ajn vi donus al virino, ŝi prilaboras tion kaj redonas ion pli gravan kaj pligrandan

Donu al ŝi semon, ŝi kreos infanon

donu al ŝi domon, ŝi kreos hejmon

donu al ŝi nutraĵojn, ŝi preparos manĝaĵojn

donu al ŝi rideton, ŝi donacos al vi sian koron.


Ŝi nombrigas kaj disvastiĝas tion, kion ŝi ricevas kaj redonas tion al viro en pligrandigita formo.

Se vi donus al ŝi aĉaĵon, estu preta ricevi multoblon.

—

Noteto por virinoj:

Ni virinoj estas anĝeloj...se iu rompas niajn flugilojn, ni daŭrigas nian vojojn per balailo! Ni estas elastaj.

Bonan tagon al ĉiuj virinoj! 

Mondaj proverboj

Por ke vi ekkonu vojon antaŭ vi, demandu al tiuj, kiuj reiras. - Ĉinio

Amikiĝu al lupo, sed havu preparitan hakilon. - Rusio

Kredu je Dio, sed alligu vian kamelon. – Persio

De amikeco kun azeno atendu nur piedbatojn. - Barato

Vero estas bona gvidantino de vivo kaj instruistino de devoj. - Ĉinio

Anonimo el interreto

Pri telefonado

Milan Vodička, Vikend DNES 8-a-9-a decembro, 2012

Mi estis en Izraelo kaj en Nazareto mi aŭdis, kiel du lokaj araboj telefonas. Ŝajnis al mi, ke temas pri klopodo akiri mondan premion pri enmeto de la vorto Alaho en unuajn du minutojn de la parolado. Estis facile kompreni, ke ili demandas pri sano de gepatroj, aŭtomekanistoj, virinoj, infanoj kaj iliaj lernoprizorgantoj. Ĉiun raporton pri ili mia apudsidanto ĉiam kontente jesis per kapo kaj dankis al Alaho. Nur poste ili komencis trakti pri ia komerco.

Kiam mi parolus (en Ĉeĥio), mi irus direkte al la afero. Notinde estas: en eksterlando oni devas scii, kiel telefoni.

Eĉ poŝtelefonon oni nomas diverse. En Usono oni nomas ĝin „celular“, en Britio „mobile“, en Germanio „handy“, en Bangladeŝo „mutophone“, en Ĉinio „ŝou ĉi“, en Izraelo „pelefon“ (mirakla telefono), en

Suda Ameriko „celulat“ kaj en Pollando „komorka“, ĉar poloj sklave tradukis la anglan cell – ĉelo.

Simple – ĥaoso. La aparato, kiu havas taskon ligi, misplektis lingvojn. Sed tio ankoraŭ ne estas ĉio.

Se vi kondutas per poŝtelefono en eksterlando alie ol hejme, povas naskiĝi skandalo. Jen en Hamburgo en knajpo oni ĝisbatis viraĉon, ĉar li konstante kaj longe telefonvokis. Sufiĉas, ke vi en Japanio vokas en trajno. Ekestos la sama skandalo, se vi ekbruligus cigaredon en aviadilo. Atentigas pri tio surskriboj kaj voĉo el laŭtparolilo.

En Barato estas alie. Antaŭ kelkaj jaroj mi spertis, kiel homoj amase telefonis en kinejo dum prezentado de filmo. Eble la filmo ne estis bona.

En Afriko kutime oni nur sonoras. Iam temas pri kodita raporto, ekzemple „mi pensas pri vi“, sed ĝenerale peto pri revoki. Ekzemple sonoras riparisto, ke la riparo de via kudromaŝino jam estas finita. Cetere, temas pri via maŝino!

Dume hispanoj, italoj kaj aliaj sudlandanoj parolas ĉie, ĉiam, tamen ie jam flustras. En iuj restoracioj renovigis malnovajn telefonbudetojn, por telefonanto povu enveni kun sia poŝtelefono. Ie oni al homoj rekte rekomendas ĉesigi sonoradon, aŭ deponi la aparatojn en vestejoj kiel pistolojn.

Oni trovis, ke telefonado ĝenas bestetojn. En Ohio en Usono validas juĝo: ne uzi telefonon dum ĉasado de bestoj, dum pelado de bestoj, uzado de kaptiloj, arkoj aŭ fusiloj.

Do, memoru: haltigi telefonon en aviadilo, en Japanio en trajno, en hamburga restoracio kaj dum ĉasado de ursetoj en Ohio.

Traduko JoDo



Ŝoforo kaj ŝoforinokolizas unu kontraŭ al la alia. Ambaŭ aŭtomobiloj detruigis, sed homoj ne estas vunditaj.

Kiam ili eliras el siaj difektitaj vrankoj, la virino diras al la viro: „Vidu, vi estas viro, mi virino kaj vidu miajn aŭtojn, tia domaĝo, sed ni ne estas vunditaj. Certe la dio gvidis miajn vojojn, ke ni renkontiĝu, amikiĝu, eble ni vivu tiel ĝis la morto.“

Kaj la virino daŭrigas: „Kaj vidu pluan miraklon, mia aŭtomobilo estas tute nuligita, sed tiu ĉi botelo da konjako restis sen difekto. La dio certe deziras, ke ni komune trinku kaj omaĝu nian feliĉon,“ kaj prezentas al la viro botelon. Li kapjesas, la botelon malfermas kaj profunde trinkas, poste la botelon redonas al la virino.

Ŝi la botelon ŝtopigas kaj redonas al la viro en manon.

Li demandas: „Ĉu vi ne trinkos?“

Ŝi respondas: „Ne, mi atendas, ĝis venos policistoj.“

Ĉeĥa geniulo Jara Cimerman

Karel Votoček, Ĉeĥio

Enkonduko.

La plej eminenta eltrovisto, verkisto, komponisto, pentristo kaj skiisto el la tuta mondo estis forgesita ĉeĥa geniulo Jara Cimerman. Pri tiu fakto ni povas diskuti, ni povas disputi, ni povas eĉ malkonsenti, sed tio estas ĉio, kio estas tiukaze farebla.

Jara naskiĝis en Vieno en la jaro 1857, 1864, 1872, 1887 aŭ en iu alia jaro. Distrikta matrikulisto estis ofte ebria, do liaj enskriboj estas malfacile legeblaj.

Kiel fakte estiĝis genieco de Jara? Ja liaj gepatroj estis simpla ĉeĥa tajloro Leopold Zimmermann kaj aŭstra teatra aktorino Marlen Jelinkova. Verŝajne ĉefa kaŭzo de lia genieco estas tio, ke li ne travivis puberecon (seksmaturiĝon). Liaj gepatroj vestis lin dum lia infanaĝo per knabinaj vestoj, kiujn demetis lia pli aĝa fratino Luisa. Plue Jara vizitadis por knabinan lernejon. Kiam li fine eksciis, ke li estas viro, tiam estis jam post lia pubereco, ĉar knabinoj maturiĝas pli frue. Tial restis al li multe da cerboĉeloj, kiuj kutime perdiĝas dum pubereco.

Ankoraŭ mi volus aldoni, ke malgranda Jara vizitadis antaŭtagmeze ĉeĥan lernejon kaj posttagmeze la germanan. Lia verkaĵo estas tial skribita parte ĉeĥe, parte germane. El tio konkludis aŭstria profesoro Fiedler (li estas nur mezlerneja profesoro, ne alterneja!), ke Cimerman estas aŭstria geniulo, ne la ĉeĥa. Sed ĉi tiun aserton ni povas facile refuti citante el lia CD (Cimrmanův deník - Taglibro de Cimerman), kie li skribas ĉeĥe laŭvorte: „Mi sopiras ekvidi fine mian patrujon – Böhmen.”

Dum sia junaĝo Jara interkonatiĝis ankaŭ kun Sigmund Freud, kiu foje vizitis lian patron por riparigi sian vestaĵon. Ĉi tiu eminenta psikoanalizisto vekis geniecon de malgranda sentema infano. Post iom da tempo foriras Jara al la mondo (en la aĝo inter 7-42 jaroj).

De tiu tempo ni trovas liajn spurojn praktike tutmonde. Al usona registaro li ofertas projekton de Panama-kanalo inkluzive de samnoma opero. Kun grafo Zeppelin li konstruas unuan aerŝipon. Kiel anarĥiisto li estis ekzilita el Germanio. Ĉar en liaj dokumentoj aperis „konstruisto de maltrankvilo“, svisa firmao OMEGA postulis de li, ke li pliperfektigu ĝian horloĝon. Cimerman ankaŭ funkciis en svisaj Alpoj kiel akuŝisto, ĉar akuŝistinoj ne povis vintre ofte atingi ĉiujn lokojn (sur skioj). Poste Cimerman esploris vivstilon de eskimoj. Bedaŭrinde tiam li maltrafis nordan poluson je 7 metroj. En Paragvajo li fondas marionetan teatron por klarigi al kamparanoj nocion „pup-registaro“. Kiel meblar-agento li troviĝas inter gaŭĉoj en Argentino. En Johanesburgo (Sud-Afriko) li fondas muzeon de vaksaj statuoj. Konata estas precipe duopo: Kolombo frakasanta ovon al frunto de Napoleono. Certe estas konata ankaŭ plua lia skulptaĵo: Taras Bulba antaŭ Konstanca konsilio. Baldaŭ Cimerman rapidis al alia lando. Tial li vendis sian vaksan muzeon al iu nekonata sinjorino el Londono.



O-O-O

La espero ne estas konvinko, ke io sukcesos, sed certeco, ke io havas sencon est farita – sen kredo de sukceso.

Komenio

28.3.1592 naskiĝis Johano Amoso Komenio - (Comenius) - instruisto de nacioj, episkopo de la „Unuiĝo de Fratoj“ (husana eklezio), filozofa, poeto, verkisto kaj edukisto. Pri la loko de naskiĝo daŭras centjara historiista konflikto, ĉu Komna, verŝajna loko de lia aŭtenta gento, aŭ proksima Nivnice. Kiel filo de muelisto li estis edukata en religia zorgemo; en 16 jaroj sendita en latinajn lernejojn en Pĕřerov, post du jaroj en Heidelbergon (Germanio). Li vizitis multajn urbojn en Germanio kaj Nederlando, revenis kiel 22jara en la patrujon. Instruis en Pĕřerov kaj fariĝis pastro de la eklezio.

Li edziĝis kaj travivis kelkajn feliĉajn jarojn. Sed post la historia malvenka batalo „Sur Blanka Monto“ (apud Prago) 1620, komenciĝis persekuto far de katolikoj kontraŭ alireligianoj kaj precipe protestantoj. Pesto mortigis en 1622 lian edzinon kaj 2 infanojn. Li trovis provizoran rifuĝejon ĉe la nobelulo Ŝerotín (Ĵerotin) en Brandýs s/Orlice, kie en vilaĝdometo „Pod Klokoty“ li skribis siajn verkojn.

1624 li devis forlasi sian patrujon. Li multe vojaĝadis kaj post 1628 dum kelkaj jaroj li vivis en Pollando, en urbo Leszno, (Leŝno), kie ekzistis de la jaro 1518 multnombra komunumo de la „Unuiĝo de Fratoj“. Grandega incendio de la tuta urbo kaj perdo de favoremo de la urba protektanto kaŭzis, ke kun multaj ekzilitoj li foriris en Nederlando. Tie li vivis kiel gasto de la familio van Geer; li vizitis ankaŭ Londonon kaj en 1642 akceptis inviton de sveda kanceliero. Poste li vivis en prusa Elbing. Li revenis ankaŭ en Leszno, sed tie mortis lia dua edzino. Post kelkmonata restado en Hungario, kie li trovis loĝadon ĉe nobelaro Rakoczy, li translokiĝis en Nederlando, kie li restis ĝis sia morto en Amsterdamo 15.11.1670.

Lia tombo troviĝas en Naarden. Ĉie, kie li restis, li multege laboris. Same kiel por Londono, tiel ankaŭ por Svedio signifis liaj laboroj renovigon de pedagogia reformo. Li verkis moderne aspektajn pedagogiajn librojn:

„Didactica magna“ „Zlaté dveře jazykům otevřené“ (Ora pordo apertita al la lingvoj), „Orbis pictus“ kaj multajn aliajn. Liaj religiaj verkoj kaj libroj dediĉitaj al ĉeĥa nacio, estis multe neniigitaj dum lia malfeliĉa ekzilula pilgrimado.

Komenio okupiĝis, dum sia tuta longa kaj malfeliĉa vivo, pri la ideo kiel plibonigi homan socion surbaze de morala kaj racia edukado de junularo. En sia libro „Via lucis“ (Vojo de lumo) li mencias neceson inventi facilan komunan lingvon por la tuta homaro. „Estus pli bone uzadi unu novan komunan lingvon, ol ke junularo lernu multegajn naciajn lingvojn por interkompreniĝi.“

(Laŭ „Historia Kalendaro de Ĉeĥa Nacio“ de Martin Jan Vochoč kaj Vikipedio.eo).

Emmanuel

Mediumo: Francisco Cândido Xavier

Klopodu uzi monon, korpon kaj tempon por la bono.

Riĉaĵoj transloĝiĝas de domo en domon.

La korpo konsumiĝas laŭ la tempopaso.

Havaĵoj, kiujn vi arigas, diseriĝos en heredojn.

Laŭ la leĝoj de Dio, vi havas nur tion, kion vi donas.

Via trezoro konsistos nur el viaj bonaj agoj por la aliaj.

Tradukis esperanten: Jader Rodrigues da Silva

El la libro Reĝo Maĉjo la Unua de Janusz Korczak



Kiam mi estis tia, kia sur la foto, mi mem deziris fari ĉion, pri kio mi skribis ĉi tie. Poste mi tion forgesis, kaj nun mi estas maljuna. Kaj mi ne plu havas tempon, nek forton, por militi kaj vojaĝi al kanibaloj. Kaj tiun ĉi foton mi donis, ĉar estas grava la

tempo, kiam mi volis fariĝi reĝo, kaj ne – kiam pri la reĝo Maĉjo mi skribas. Kaj mi pensas, ke estas pli bone prezenti foton de reĝoj, vojaĝantoj kaj verkistoj, kiam ili ankoraŭ ne plene kreskis kaj ne maljuniĝis, ĉar se ne, ŝajnos, ke ili tuj fariĝis saĝaj kaj neniam estis malgrandaj. Kaj la infanoj pensos, ke ili ne povas fariĝi ministroj, vojaĝantoj kaj verkistoj, sed tio ne estas vero.

La plenkreskuloj tute devus ne legi mian romanon, ĉar en ĝi estas ĉapitroj nekonvenaj, do ili ne komprenos kaj ridos moke. Tamen se ili nepre volas, ili provu. Al la plenkreskuloj ne estas ja eble malpermesi, ĉar ili ne obeos – kaj kiu faros ion al ili?

En traduko de Tomasz Chmielik

*La libron mi vere rekomendas legi por infanoj, eĉ por plenkreskuloj, ĝi estas fascina, unika. Mi legis ĝin sen ĉeso, ĉar unu aventuro sekvas la alian.

La libro aperis en Esperanto en la jaro 2009 en Świdnik en Pollando. La aŭtoro, konata ankaŭ kiel *Maljuna Doktoro* mortis en la jaro 1942 en Treblinka kun orfoj kiujn li prizorgis. JoDo.

Romanco pri Karolo La Kvara

Jan Neruda

Ĉe kverka tablo reĝo Karolo
kun Bušek z Velhartic nun lokojn
prenis;
jam ofte ili kone trinkfestenis
kantante laŭ plezura volo.
“Pokalojn orajn! — Verŝu plene!
la reĝo ordonas al paĝo
Nun, Bušek, ion ŝertos Vi!”
li diras ĝojmiene.
“Jen, Bušek, la unua vino,
kiun ĉe ni kulturi mi sukcesis;
ĝin antaŭ jar’ ĉi-landa sun karesis!”
Subite, gustuminte ĝin,
kraĉetas li. “Ho ve ĝi estas
ne vino, sed buŝkurbiga feĉo!
Ĝi nukon mian rompos eĉ! —

La reĝo tamen post momento
retrinkis.
Lia milda okulparo
kaŝeme turnas sin al la najbaro —
sed tiu restas en silento;
nur — por ne teni sin senmove —
li trempas lipojn en la vino,
al la palato premas ĝin,
sur lingvo ĝin rulas prove.
La reĝo ripetas: „Jen ĉagreno...” —
sed li rapide novan gluton faras
kaj sian pluan plendon tiel baras;
sed sereniĝas la mieno.
„Pokal’ malplenas! Ha, terure!
Nu, Bušek, ne malĝoju plu!
Jen kion diras via reĝo prudenta:

kaj li kolere gestas.
“Eh! - el burgunda vinober“,
la reĝo ekscitite plu murmuris,
“ĉi tian vermutaĵon elkulturas
la adorata Ĉeĥa ter“!
Pri persikarbo mi ne miros,
prunelojn se produktos ĝi;
plantante rozojn tie ĉi,
nur mokon mi akiros...
Kaj kia lando, tia gent“!
Jes, ĉiu Ĉeĥo estas obstinulo:
li pagus eĉ predikon de sanktulo
per bato – aŭ per malatent“.
Jen kvazaŭ draŝ“ de pajla fasko;
nur tion sperti, ke sen ĉes“
min persekutas malsukces“ –
kiel ĉagrena tasko!“

nun mia lango, certe subtilsenta
ĉi vivon taksas jam kun ĝu“.
La juĝo devas esti justa!
Ĝi estas vin“ de stranga spec“:
maldolĉon sekvas agrablec“ –
ni trovas ĝin bongusta.“
„Simile, reĝo, nia gent“:
malmilda ŝajnas ĝi kaj iom stranga,
sed ĝin ornamas ĉarmo siaranga,“
sin liberigis de l“ silent“
sinjoro Bušek tre volonte.
„Ĉi genton fidu; baldaŭ ĝin
alpremos vi al via sin“
ne plu ĝin forpuŝante!“
tradukis Rudolf Hromada

Neebla lando

Endre Dudich, Hungario

Ekkoni la pasintecon de Hungario por kompreni la nuntempajn Hungarojn

Enkonduko

La geopolitika, ekonomia kaj kultura situacio kaj la aktuala (materiala kaj spirita) stato de la hungara popolo rezultis el pli ol miljara, tre eventoplena historio. Kompreneble ne eblas ilin pritrakti sufiĉe profunde en la limigita kadro de jena prezentado. La sole ebla procedmaniero estas skizi la ĉefajn trajtojn kaj indiki kelkajn decidajn eventojn. Tiuj estas elektitaj, evidente, laŭ miaj personaj konoj kaj konceptoj. La selekto do estas neeviteble subjektiva, kaj pro tio diskutebla.

Adaptiĝi aŭ pere. Kontraŭ, aŭ kun Eŭropo?

Fine de la 9-a jarcento sep hungaraj triboj duon-nomadaj forlasis la vastan ebenaĵon de Orienta Eŭropo, kie ili vivis dum longa tempo inter turkaj popoloj. Trapasinte la montoĉenon de Karpatoj ili definitive eniris la Panonian basenon de la rivero Danubo. Ilia estro estis la duko Árpád, filo de Álmos. En la jaro 1896 oni festis la 1000-an datrevenon de tiu evento, nomita „Patrujkonkero”. Tie ili trovis sin inter setlitaj, terkulturistaj popoloj, plejparte slavaj, kiuj jam estis adoptintaj la kristanisman (kun kio cetere ankaŭ la hungaroj jam konatiĝis).

Baldaŭ evidentiĝis, ke oni devas rezigni je la nomadeca vivmaniero. Pluraj militiroj faritaj de aventuremaj tribestroj finiĝis katastrofe. La malpeza kavalerio ne estis ekipita por sieĝi fortigitajn kastelojn kaj verajn fortikaĵojn. La kirasita peza kavalerio de la feŭdalaj armeoj venkis. Iĝis

tute klare, ke tiuj pred-celaj kampanjoj ne estos jam longe tolerataj. Kaj fakte, sekvis pun-celaj kontraŭ-atakoj. Post nelonga tempo eĉ la ekzisto mem de la hungara popolo iĝis minacata. Estis do absolute necese ŝanĝi la vivmanieron, radikale modifi la strukturon de la socio organizita je gentoj kaj triboj, kaj adapti ĝin al la feŭdalismo de la mezepoka Eŭropo. Alikaze la hungarojn frapus la tragika sorto de la Hunoj de Attila, iam fortegaj kaj timataj, kiuj malaperis praktike senspure, kiel ankaŭ multaj aliaj popoloj vivintaj en la Danuba baseno, ekzemple la Avaŭroj.

Inter du imperioj ĉi-mondaj – kun tiu ĉiela

Okcidente la German-romana Imperio, kaj oriente la Bizanca Imperio prezentis tre realan danĝeron. Ili povintus senskrupule engluti aŭ neniigi Hungarion. **Jen la unua krizo je vivo aŭ morto.**

Duko **Géza** bonege komprenis, ke estas simple neeviteble adopti la kristanisman. Estis ja evidente, ke la kristanaj ŝtatoj ne tolerus la daŭran ekziston de pagana lando en la centro de Eŭropo. Li do invitis (Sanktan) **Adalberton**, episkopon de Prago, por bapti **Vajk-on**, la filon kaj sekvonton. Tiamaniere tiu iĝis **István (Stefano)**. **Géza** mem, kvankam ne tro bonvole, konsentis iĝi baptita.

Estis **Stefano** kiu trovis la genian solvon. Anstataŭ elekti inter du eblecoj egale malbonaj de feŭdala submetiĝo, li decidis por la tria, ŝajne pli spirita ol politika: li petis la papon sendi al li kronon. La papo **Silvestro la 2-a (Gerbert d’Aurillac**, eksa abato kaj ĉefepiskopo de Reimso en Francio, poste de Raveno en Italio) plenumis lian peton. La solena kronigo okazis je Kristnasko-festo de la jaro 1000. Per tiu akto de investituro, Hungario iĝis membro-ŝtato de la kristana komunumo de okcidenta Eŭropo.

Tiamaniere la unua pereiga kaptilo estis evitata.

Monto de Sankta Martino. Mil kaj unu jaroj por la eterneco.

Sankta Martino, romia eks-oficiro, ĉefepiskopo de Tours en Galio, naskiĝis en la provinco Malsupra Panonio. En Transdanubio monteto portis lian nomon ĝis 1823, kiam ĝi estis rebaptita „Pannonhalma” (Panonia monteto).

Sur tiu monteto estis konstruita la unua benediktana abatejo de Hungario en la jaro 996. La monaĥoj de la ordeno de Sankta **Benedikto** havis eminentan rolon en la kristanigo kaj edukado de la hungara popolo. Ankaŭ la unua ĉefepiskopo de Hungario, la veneciano **Gellért (Gerardo)** estis benediktano. La fonda ĉarto de la dua benediktana abatejo, tiu de Tihany (1055) enhavas la unuan frazon skribitan hungarlingve. Dum mil jaroj la monaĥejo de **Pannonhalma** estis la spirita centro de la hungara kulturo, la hungara Montserrat. Okaze de ĝia miljara jubileo, lia Papa Moŝto **Johano Paŭlo II** honoris ĝin per sia vizito.

La vera „Maryland”: la Regno de Maria (Regnum Marianum)

La ĉefepiskopo **Gellért**, organizante la hierarĥion de la hungaria eklezio, fervore enkondukis en Hungarion la kulton de la Sankta Virgulino. La reĝo **Stefano** komisiis lin eduki sian filon **Imre (Emeriko)** laŭ la spirito de katolikismo. **Gellért** plenumis tiun taskon bonege, eble eĉ iomete tro bone. Nome la juna princo, kvankam li formale estis edziĝinta pro obeemo al la volo de sia patro, votis ĉastecon. Per tiu li malebligis la direktan patralinian daŭrigon de la dinastio de la Arpadoj. Ĉar post la frua morto de sia pli aĝa frato Otto, Imre iĝis la kronprinco. Malbonŝance, **Imre** eĉ ne sekvis **Stefanon** sur la trono: en la aĝo de nur tridek jaroj ankaŭ li mortis, viktimo de stupida ĉas-akcidento -- iomete suspektinda.

La reĝo **Stefano** vidis sian regnon minacata el-ekstere de la germana ekspansio al oriento (la misfama „Drang nach Osten”), la intrigoj de Bizanco, kaj la ambicioj de Venecio, kaj el-interne de la sangaj ribeloj de iuj

grupoj de Hungaroj kiuj persistis en la paganismo, kaj obeis al siaj ŝamanoj persekutataj fare de l'Eklezio. Sentante sin malfortiĝi, sur la sojlo de la morto, en ŝajne senespera situacio, la reĝo ofertis sian popolon kaj sian landon al la **Virgulino Maria**, petegante ŝian bonvolan protekton. Per tiu akto la Sankta Virgulino iĝis la **Patronino de Hungario**, laŭ la popoleska lingvaĵo „la Granda Damo de la Hungaroj” (Magyarok Nagyasszonya) kaj „Nia Patrino la beata Damo” (Boldogasszony Anyánk).

Stefano mortis en la jaro 1038, sen postlasi idon, heredanton. Sekvis plurjara, sanga konflikto de pretendantoj al la trono. La paganaj hungaroj, gvidataj de **Vata**, profitis de la situacio. En 1046 la ribelo baldaŭ eksplodis furorege. La ribeluloj masakris la pastrojn, mortigis ankaŭ la episkopon **Gellért** ĵetante lin suben de la supro de iu danub-borda montoklifo. Nuntempe la sama monto portas lian nomon (la Gellért-monto), kaj lia bronza statuo levas la triumfantan krucon al Budapeŝto.

Jen la dua krizo je vivo aŭ morto.

La kristana Hungario preskaŭ malaperis. Tamen, post malfacila periodo de interna militado, kiu portis la landon al la sojlo de totala anarĥio, la reĝo **László (Ladislao) la 1-a** kaptis la povon en la jaro 1077. Pia kristano kaj perfekta kavaliro, li restaŭris la ordon, apogis la Eklezion, kaj rebatis la atakon de Kumanoj venintaj el oriento. (Tiu estis turka tribo vivinta en la suda parto de la orienteŭropa ebenaĵo.) Li atingis, ke la papo kanonizis la reĝon **Stefanon**, la princon **Imre** kaj la episkopon-martiron **Gellért**. Ili do iĝis akceptitaj inter la sanktulojn de la Eklezio. **László** mem sekvis ilin unu jarcenton poste, dank'al la klopodoj de reĝo **Béla (Adalberto) la 3-a**, edukita en la bizanca kortego. La mumiiĝinta dekstra mano de **Sankta Stefano** estas altvalora relikvo, gardata en la katedralo de Budapeŝto, kiu portas la nomon de la sankta reĝo.

La tempesto frapanta el Oriento. La invado de la Tataroj

La reĝo **Kálmán (Kolomano)**, nomita „la Librohavena” pro lia granda erudicio, fortigis la landon. Li estis elektita reĝo de la Kroatoj en la jaro 1102. La preskaŭ senriproĉa kunekzistado de la Kroatoj kaj de la Hungaroj en la sama regno daŭris 818 jarojn, ĝis la fino de la unua mondmilito.

Sed la milita enfalo de la Kumanoj estis malbona signo. La granda migrado de la nomadaj popoloj ankoraŭ tute ne estis finita.

Reĝo **András (Andreo) II** invitis en sian regnon la Teŭtonajn Kruckavalirojn, donacante al ili teritorion en Transilvanio. Tie ili setlis kun konsiderinda amaso de Saksoj. Ilia rezidejurbo estis Hermannstadt (laŭ la nomo de la Granda Majstro de la Ordeno; hungare Nagyszeben, nun Sibiu en Rumanio). Sed li baldaŭ devis perforte elpeli ilin, pro neobeemo. Al la postrestintaj Saksoj **Andreo** la 2-a en 1222 donis specialan Privilegion – fakte la unuan teritorian aŭtonomion en Eŭropo.

Ĥano Ĝingis kreis grandegan imperion Mongol-tataran tra la tuta nordo de Eŭrazio. Liaj taĉmentoj definitive venkis kaj dispersis la Kumanojn, kies parto serĉis rifuĝejon en Hungario. Poste la sovaĝa sed tre disciplinita armeo de unu de liaj nepoj, ĥano **Batu**, mas-atakis Hungarion.

La Okcidento vivis en la febro de la krucmilitoj: do la reĝo **Béla (Adalberto) la 4-a** ne ricevis iun ajn militan helpon. La decida batalo okazis ĉe la vilaĝo **Muhi** (en nord-orienta Hungario, proksime al urbo Miskolc) en 1241.

Tio estis vera katastrofo. La mongolaj hordoj neniigis la hungaran armeon. La reĝo, malfacile eskapinta, fuĝis en Dalmation, al Trogiro. La lando iĝis totale detruita. Ĉio estis prirabita, bruligita, la loĝantaro masakrita, deportita en sklavecon.

Sed la Tataroj baldaŭ haste retiriĝis, por elekti la sekvontan Grandan Ĥanon. De la okupita teritorio ili retenis nur la parton situantan oriente de la

malfacile trapaseblaj Karpatoj. Tie ili establis la regadon de la „Ora Hordo”, al kiu la Rusoj dum longa tempo pagis imposton.

Tiamaniere Hungario supervivis la trian katastrofon, kaj la reĝo **Béla la 4-a** iĝis la „dua fondinto” de la lando.

Karisma kaj tragika dinastio: la Arpadoj

La hungaran ŝtaton kreis kaj stabiligis la dukoj kaj reĝoj devenintaj el la gento de la Arpadoj. Tiu dinastio produktis tutan vicon da escepte talentaj, grandstilaj personaĵoj. Karakterizis ilin speciala sinteno: starante firme, dupiede sur la tero, ili rigardis al la ĉielo por esplori la estontecon. Ili estis bonegaj organizantoj, diplomatoj, militestroj, sanktuloj...

Cetere, la sankta karismo de la dinastio origininte el la fora pasinteco, longe antaŭ la adopto de la kristanismo, ne estis privilegio de la viraj anoj. Unu de la filinoj de la reĝo **Béla la 4-a**, kiel dominikana monaĥino pentofaranta pro la pekoj de la popolo, iĝis **Sankta Margerita**. (La insulo de Danubo en Budapeŝto, kie staris ŝia monaĥinejo, kaj la fera ponto tien kondukanta, portas ŝian nomon.) Kvar pliaj reĝidinoj de la Arpadoj, edzinigitaj al estroj de aliaj landoj, estis ankaŭ kanonizitaj: **Kinga (Kunigunda)** en Krakovo, Pollando, **Elizabeta** en Vartburgo, Saksio, kaj alia **Margerita** en Edinburgo, Skotlando; **Piroska**, filino de reĝo **Ladislao**, iĝinta imperiestrino de Bizancio, estis kanonigita de la ortodoksa greka eklezio sub la nomo **Irene**. Do 5 virinoj kompare al 3 viroj!

La malhela flanko de la karaktero de la Arpadoj estis ties impulsiveco, la senbrida rivalado inter fratoj kaj kuzoj, kiu ofte iĝis mortiga.

La lasta reĝo de la dinastio de la Arpadoj, **Endre (Andreo) la 3-a** mortis en la jaro 1301. Prezenti sin pluraj tronpretendantoj, kaj denove civitana milito minacis la landon.

Ĉu, jam la kvaran fojon, fino de Hungario?

Inter tri maroj. La anĝevina florado

Finfine venkis **Karlo Roberto**, el la napola branĉo de la anĝevina (Anjou) familio. Tia-maniere la 14-a jarcento en Hungario iĝis la bela anĝevina epoko.

Menciindas la kunveno de tri reĝoj (tiuj de Hungario, Bohemio kaj Pollando) en la ĉe-danuba fortikaĵo Visegrád_en 1335: vera mezepoka regiona renkontiĝo de ŝtatestroj. Kvin jarojn pli poste la filo kaj posteulo de Karlo Roberto, **Lajos (Ludoviko)** iĝis elektita reĝo de Pollando. Li meritis la epiteton **la granda**: lia unuigita regno etendigis de la Adriatiko norden ĝis la Balta Maro (escepte la regionon okupitan de la teŭtona kruckavalir-ordeno direktata el Malbork) kaj sud-orienten ĝis la Nigra Maro. Li fondis la unuan universitaton de Hungario en la urbo Pécs_(Quinque ecclesiae), sed tiu ne transvivis la sortoturnojn de la historio.

La tronon de Pollando heredis lia filino **Hedvig (Jadwiga)**. Edziniĝinte kun **Jagelono**, la granda duko de Litvo, ŝi sukcesis definitive kristanigi la litvanan popolon kaj establi „person-unian” regadon de la du landoj. El tiu edz(in)iĝo fontis la Jagelona dinastio.

Kolektanto de kronoj: Sigmundo de Luksemburgo

Sigmundo estis filo de imperiestro **Karlo la 4-a** kaj de la pola (pomerania) princino **Elisabeta**. Naskiĝinta en 1368, li iĝis reĝo de Hungario en 1387, de Germanio en 1400 (kronita nur en 1414), de Ĉeĥio en 1420, de Lombardio en 1431. Fine papo **Eŭgeno la 5-a** kronigis lin romia-germana imperiestro en 1433.

Sigmundo estis ege malsukcesa militestro. Preskaŭ ĉiuj liaj militoj fiaskis, kontraŭ diversaj malamikoj: la Turkoj (Nikopolo 1396, Galambóc 1428), Venecio (1413-1433), la Husanoj (1420-1427). Tio instigis lin konstruigi imponan defendlinion de fortikaĵoj en la sudo de sia regno. Tiatempe de la decida ofensivo de la Otomana imperio savis Hungarion tio, ke **Timur Lenk** en batalo ĉe Ankara venkis, eĉ kaptis sultanon **Bajazidon la 1-an**.

Li estis multe pli sukcesa kiel eŭrop-skala diplomato. Li provis paciĝi la anglojn kun la francoj, lerte profitis el la konflikto de Pollando kun la Teŭtona kavalirordeno (Grunewald 1410). Ĉefrolis en la gravega

Koncilio de Konstanco. Li ne sukcesis savi **Johanon Huson**, sed sukcesis finigi la katastrofan epokon de tri samtempaj papoj.

Sigmundo rezidis ĉefe en Buda, kies kastelon li impone plukonstruigis kaj fortikigis, poste ankaŭ en Pozsony / Presburgo / Bratislavo. Neniu mono sufiĉis al li. Li eĉ lombardis 13 urbojn de norda Hungario al **Vladislavo la 2-a**, reĝo de Pollando. Li forpasis en 1437, ne postlasante filon.

La Lunarko kontraŭ la Kruco. La otomana minaco

Alproksimiĝis nova danĝero, ĉi-foje el sud-oriento. Temas pri la Otomana Imperio, kiu paŝon post paŝo gajnis terenon sur la Balkana duoninsulo. Dum la 15-a jarcento okazis pluraj militaj konfliktoj kun la Turkoj ĉe la suda landlimo de Hungario, ĉiam pli kaj pli gravaj. La plej fama estro de la hungara armeo estis **János Hunyadi** (edukita de **Sigmundo**), fidela alianculo de **Skanderbego**, la nacia heroo de la albana popolo. Tamen eĉ li suferis du katastrofajn malvenkojn. En la batalo ĉe Varno borde de la Nigra Maro, en la jaro 1444, la juna kaj tro impeta **Ulászló (Vladislavo) la 2-a**, reĝo de Hungario kaj Pollando, trovis la morton. La alian fojon ĉe Rigómező (Kosovo polje) post la perdita batalo **Hunyadi** estis tenata en kaptiteco de **G. Brankoviĉ** serba despoto. Liberiĝinta (fakte, re-aĉetita) li returnis al Hungario kaj rekomencis organizi la defendon de la lando, kiel Ĝenerala Gubernatoro de Hungario.

En la jaro 1453 la otomana armeo prenis Kostantinopolon, la „duan Romon”. Tio signifis la finon de la bizanca imperio, kies spirito survivis en Moskvo konsideranta sin „la tria Romo”.

Tri jarojn pli poste, la turkoj eksieĝis Belgradon. **Hunyadi**, forte apogata de la entuziasmiga elokvento de la itala kapuceno **Johano de Kapistrano**, sukcesis defendi la fortikaĵon: la turkoj retiriĝis. La papo **Kaliksto III** (la hispano **Alonso de Borja**), sen-ŝarĝiĝinte, tuj ordonis, ke ĉiuj sonorilegoj de ĉiuj preĝejoj en la kristana mondo sonu ĉiutage je tagmezo, memore al tiu venko. Bedaŭrinde ambaŭ **Hunyadi** kaj **Kapistrano** iĝis viktimoj de la post-sieĝa epidemio.

Italio transplantita al la Danubo. La renesanco en Panonio

En la jaro 1458 **Mátyás Hunyadi** (Matiaso Korvino), la pli juna filo de **János Hunyadi**, iĝis unuvoĉe elektita reĝo de Hungario. Li estis la unua „plebana” reĝo de la lando. Personaĵo tre talenta, firma kaj multflanka, li iĝis bonega suvereno (nomita **la justa**), efika militestro (li kreis la profesian nigran armeon bone pagatan kaj okupis eĉ Vienon), kaj krome li estis ankaŭ donacema patrono de la literaturo kaj de la belartoj. Lia kortego rapide iĝis fama centro de humanistoj venintaj ĉefe el Italio. Sekvinte la ekzemplon de **Ludoviko la Granda**, ankaŭ **Mátyás** fondis universitaton, en la urbo Pozsony (Bratislavo). Bedaŭrinde tiu Istropolitana Akademio havis la saman faton kiel la antaŭa universitato en Pécs.

Reĝo **Mátyás** mortis (probable venenigite) en Vieno (1490), sen lasi legitiman posteulon. La monarkoj lin sekvintaj estis malfortaj, facile manipuleblaj fare de la variaj klikoj de la aristokratio. La servutuloj estis brutale ekspluatataj. Ne estas do mirinde, ke la krucmilito deklarita en 1514 rapide transformiĝis je ribelo, poste vera milito de kamparanoj, estrata de **György Dózsa**. La armeo de la nobeluloj, estrata de **János Zápolya**, triumfis, kaj la venĝpunoj estis ege kruelaj, eĉ laŭ la kutimoj de la epoko.

Tranĉite je tri partoj. Du jarcentoj de kontraŭ-turkaj militoj

En la jaro 1526, la timegata sultano **Sulejmano la 2-a (la Granda)** lanĉis imponan milit-kampanjon kontraŭ Hungario. La hungara armeo de reĝo **Lajos (Ludoviko) la 2-a** nombris nur dekonon de la turka. En la bataalkampo de Mohács ĝi suferis totalan neniigon. Eĉ la reĝo ne eskapis la morton.

La vojo estis malfermita al Buda kaj Vieno. Tamen la turkoj ekposedis Buda-n, la ĉefurbon de Hungario, nur dekkvin jarojn poste en 1541.

Tiun kvinan katastrofon eĉ pligravigis tio, ke la hungaroj, kiel kutime, estis dividitaj.

La mortintan reĝon sekvis tuj du novaj: **Ferdinando de Habsburgo** en *okcidento* kaj *nordo*, kaj **János Zápolya**, vojevodo de Transilvanio en *oriento*. (Ĉi-lasta, la venkinto kaj ekzekutinto de kampanoj, alvenis „prudente” tro malfrue al la batalejo de Mohács).

La *centra parto* de la lando estis okupita de la turkoj. La preĝejoj iĝis transformitaj je moskeoj. Ĝis la fino de la 17-a jarcento tiu regiono estis la sombra scenejo de alvenoj kaj foriroj de taĉmentoj, de sinsekvo de sieĝoj de fortikaĵoj, de kontraŭ-atakoj, ktp. La sekvoj de tiu senĉesa militado estis katastrofaj. Hungario iĝis dua-ranga provinco de la forta imperio de la Habsburgoj. Ĝia loĝantaro stagnis, eĉ malkreskis. La lumo de la kulturo ŝajne estingiĝis.

La fortikaĵo de Buda iĝis liberigita nur en 1686, t.e. 160 jarojn post la malvenko ĉe Mohács, kaj tri jarojn post la sieĝo de Vieno (kiun savis la ĝustatempa alveno de la armeo de la pola reĝo **Jan Sobieski**), fare de la unuiĝintaj armeoj aŭstria kaj hungaraj, estrataj de princo **Eŭgeno de Savojo**.

Miraklo de akrobata diplomatio: la feĝardeno Transilvanio

Malgraŭ ĉio, la kulturo kaj la tradicioj de la Hungaroj ne nur restis vivantaj, sed ili eĉ sen-precedente ekfloris. Tio okazis en regiono relative bone ŝirmita, Transilvanio („Trans-arbarujo”). Tiu regiono ĉiu-aspekte tre varia iĝis pli-malpli sendependa princlando, foje pagante imposton al la Sultano, foje koketanta kun la Habsburgoj.

En Transilvanio oni rekonis tri naciojn: la **Hungarojn**, la (same hungarlingvajn) **Sikulojn**, kaj la germane parolantajn **Saksojn**. (La Sikuloj, laŭ sia propra tradicio, estas idoj de la Hunoj de **Attila**. Laŭ iuj fakuloj – tiuj de la Avaŭroj, laŭ aliaj – simple unu el la hungaraj triboj. Ili gardadis diversajn sektorojn – ne nur la orientan – de la landlimo.). La Rumanoj estis lasitaj ekster konsidero.

Oni toleris kvar religiajn konfesiojn: la katolikan, la kalvinan, la luteran kaj la unitaran (kontraŭ-triunuan), kies egalajn rajtojn deklaris la **Nacia Asembleo de Torda en 1568** — la unuan fojon en Eŭropo! — kaj konfirmis la pactraktato de Vieno en 1608.

Ne temis pri la ortodoksa eklezio, nek pri la judoj. Jen bedaŭrindaj mankoj, kiuj — kvankam ili estis konformaj al la spirito de la epoko — en historia perspektivo havis katastrofajn sekvojn.

Oni konstruis lernejojn kaj kolegiojn, establis presejojn. La sciencoj kaj artoj floradis. Kompare al la priplorinda stato de la du aliaj pecoj de Hungario, Transilvanio sendube estis feĝardeno, nomo donita al ĝi de la verkisto **Zsigmond Móricz**, titole de lia historia romano.

Post la fino de la turkaj militoj, Transilvanio iĝis aparta „grandprinclando” de la aŭstria imperio. Sed ĝi gardis sian rolon kiel **hejmo kaj rifuĝejo de la hungara kulturo**.

Protestantismo kaj nacia identeco. Reformacio kaj kontraŭ-reformacio laŭ hungara maniero

Jam reĝo **Mátyás** batalis kontraŭ la husismo, kvankam pro kialoj pure politikaj. Sed post la reformacio fare de **Martino Luther** (1517), ekestis grava malakordo de spiritoj en Hungario. La Habsburgoj estis fervore katolikaj, kaj preskaŭ senescepte netoleremaj, do la protestantismo rapide fariĝis esprimilo de la nacia rezisto de la Hungaroj. Antaŭ ĉio la rigora kaj puritana kalvinismo pretendis esti „la vera hungara religio”. Ties centro en Hungario, la urbo Debrecen, ĝis hodiaŭ fieras esti la kalvinista Romo. La loĝantaro de la lando iĝis preskaŭ tute protestanta. (Cetere, tio estis ekzakte la malo de tio, kio okazis en Pollando, kie la katolikismo protektis la nacian identecon de la poloj kontraŭ la protestantaj prusoj kaj la ortodoksaj rusoj.)

En Transilvanio, **Ferenc Dávid** (Franz Hertel) fondis Unitaran Eklezion, kies doktrino ne akceptas la dogmon pri la Sankta Triunuo.

En tiu kriza momento sursceniĝis la Societo de Jesuo. Ankaŭ en Hungario estis la jezuitaj patroj la direktantoj kaj kunordigantoj de la kontraŭ-reformacio. Bonŝance ilia ĉefrolulo, la kardinalo **Péter Pázmány**, ĉefepiskopo de Esztergom kaj la primaso de Hungario, estis ankaŭ patrioto kaj unu de la unuaj elstaraj majstroj de la hungara literatura lingvo. Li avertis siajn kontraŭulojn, la protestantajn pastorojn, ke „ni troviĝas inter du paganismoj, batalante por la sama patrujo”. En la jaro 1635 li fondis la trian universitaton de Hungario, en la urbeto Nagyszombat (nun Trnava en Slovakio), la unuan kiu sukcesis transvivi kaj ekzistas eĉ nun. Translokigita al Buda en 1776, kaj poste al Pest. Ĝi funkcias nun kiel la budapeŝta Universitato de Sciencoj (ELTE), dum la nomon de la granda kardinalo portas la tute novtempe (en 1992) establita Katolika Universitato (en Piliscsaba).

Mult-etna reloĝantigo post la detruigo

Fuĝinte antaŭ la Turkoj, konsiderinda nombro de sudaj slavoĵ, precipe Serboj, rifuĝis en Hungarion, gardante ankaŭ tie sian lingvon kaj sian nacian kulturon. La Serboj ricevis eĉ la privilegion de la surdanuba komerco. La urbeto Szentendre, situanta 20 kilometrojn norde de Buda, iĝis ilia religia, kultura kaj komerca centro.

Post la definitiva liberiĝo de la lando desub la otomana regado, la imperiestra kaj reĝa kortego en Vieno komencis reloĝantigi la preskaŭ senhomigitajn teritoriojn. La plejmulto de la tien senditaj koloniistoj estis etne germanaj, kaj parte slovakaj. La sekvoj de tiu intenca etna diversiĝo estas eĉ nun observeblaj sur la etna kaj lingva kartoj de Hungario, eĉ post la perforta elpelo de la germane parolantaj Ŝvaboj kaj la „interŝanĝo de loĝantaro” kun Ĉeĥoslovakio, altruditaj al Hungario post la dua mondmilito.

Kun lingvo morta kontraŭ lingvo tro forta. Rezisto, reviviĝo, revolucio

Komence de la 18-a jarcento, la „maldankemaj” Hungaroj ribelis kontraŭ la aŭstria regado, personigita de la habsburga Imperiestro kaj reĝo. La ĉefo de la ribelo (1703-1711) estis **Ferenc (Francisko) II Rákóczi**, princo de Transilvanio, edukita en Vieno.

Jen unu hungara paradokso pli: sur la flagoj flirtantaj super la taĉmentoj marŝantaj kontraŭ tre katolika reĝo, estis videbla meze la Virgulino Maria, kaj malsupre latina surskribo

Maria adjuvante cum Deo pro patria et libertate

Tio signifas: „*Sub la patronaĵo de Maria, kun Dio por la patrujo kaj la libereco*”.

La ribelo, ricevinta nenian helpon el eksterlando, malvenkis.

Jen la sesa krizo!

Rákóczi rifuĝis Turkion, kaj mortis tie en ekzilo. (Ankoraŭ alia paradokso, kiu cetere estis ripetiĝonta unu kaj duonon da jarcento pli poste.)

La longa regado (1740-1780) de **Maria Tereza** (reĝo, kaj nereĝino de Hungario!) estis finfine periodo relative paca. La lando povis iomete resaniĝi. La leĝo **Ratio Educationis** metis la fundamentojn de la moderna sistemo de edukado. Eĉ la ideoj de la francaj enciklopedistoj kaj de la framasonoj enfiltriĝis.

Imperiestro **Jozefo la 2-a**, filo kaj senpera posteulo de **Maria Tereza** – li mem framasono – ricevis de la hungaroj la moknomon „ĉapel-portanta reĝo”. Nome li rifuzis esti kronita per la krono de Sankta Stefano, por ke li ne estu devigata respekti la elmodiĝintajn privilegiojn de la hungara nobelularo, kies plimulto estis tre konservema kontraŭ ĉiu reformo.

Jozefo la 2-a forpelis la jezuitojn el la lando, dissolvis la monaĥajn ordenojn, kaj deklaris la germanan lingvon la sola oficiala lingvo de la imperio. Sed li renkontis obstinan reziston, kiun li ne kapablis fleksi. Li mortis elreviĝinte, nuliginte preskaŭ ĉiujn siajn reformojn.

Tiel okazis, ke la latina lingvo, heredita de la Mezepoko, restis la oficiala lingvo en Hungario ĝis la jaro 1844 (kaj en Kroatio eĉ ĝis 1847!). En 1844, ĝi iĝis anstataŭigita per la hungara.

Reĝo **Francisko la 1-a** decidis preventi eventualan revolucion similan al la franca: li ordonis ekzekuti la kvin gvidantojn de la Klubo de hungaraj jakobenoj en 1795.

Tamen eĉ la imperiestra teroro ne povis haltigi la marŝon de la **historio**. La unua duono de la 19^a jarcento estis la epoko de reformoj en Hungario. La ekonomia kaj kultura progreso – inkluzive la adapton de la hungara lingvo al la bezonoj de la moderna vivo – akceliĝis, stimilita kaj direktata ĉefe de grafo **István Széchenyi**. Li, estinte interalie la fondinto de la Hungara Akademio de Sciencoj, plene meritis la epiteton „**la plej granda hungaro.**”

La 15-an de marto 1848 – la fama tago de la „paca revolucio” de junaj intelektuloj, inter ili la poeto **Sándor Petőfi** – ŝajnis, ke la kompleta sendependeco kaj la daŭra prosperado de Hungario estas ĉe-mane. Sed tio estis nur danĝera iluzio. Eĉ pli malbone: fatala eraro, kiu havis altegan prezon. Tamen oni firme kredis je ĝi, kontraŭ ĉiu politika logiko, ĉar oni volis kredi.

Dudek jaroj perditaj. La milita interveno de Rusio

La febra aktivado de la Nacia registaro de Hungario, prezidata de grafo **Lajos Batthyány**, estis tre pozitiva. Sed ĝi ne sukcesis gajni la masan apogon de la ne-hungaraj etnoj de la lando. La alloga ideo de iu **Danuba Konfederacio de liberaj popoloj**, proponita de grafo **László Teleki**,

ministro de la eksteraj aferoj, kaj reprenita poste – tro malfrue – de **Lajos Kossuth**, restis nur bela revo.

En aprilo 1849, kiam la milito por la sendependeco de Hungario, komencita en septembro 1848, daŭris jam duonjaron, la Hungara Nacia Asembleo havanta sesion en Debreceno, prezidata de **Lajos Kossuth**, adoptis la fatalan decidon detronigi la dinastion de Habsburgoj. La imperiestro tuj petis la intervenon de Rusio. La caro plenumis sian promeson, kaj fortega rusa armeo invadis Hungarion. En Transilvanio unu de la komandantoj de la hungara armeo estis la pola **Jozefo Bem**. Post la batalo de Segesvár (Șighișoara), kie interalie malaperis ankaŭ la poeto **Sándor Petőfi**, la milita situacio estis jam netenebla. La ĉefkomandanto de la hungara armeo, generalo **Artur Görgey**, kapitulacis antaŭ la rusa marŝalo **Paskieviĉ**, la „heroo de Jerevano” kaj „ekzekutisto de Varsovio”. La triumfintaj kaj venkebriaj Austrianoj ekzekutis, en la urbo Arad, la 6^{an} de oktobro 1849, dek-tri generalojn de la „ribela” hungara armeo. (**Görgey** ne estis inter ili, ĉar **Paskieviĉ** ne permesis ekzekuti tiun, kiu al li transdonis sian glavon.) La ĉefministro **Batthyány** iĝis mortpafita en Pest.

Lajos **Kossuth**, la nekontestita gvidanto de la revolucio kaj Gubernatoro de Hungario, forlasis la landon, fuĝante en Turkion, akompanata de kelkaj siaj fideluloj. Li kunportis la kronon atribuitan al Sankta Stefano. Poste li faris propagando-celajn rondvojaĝojn en okcidenta Eŭropo kaj eĉ en Usono, defendante brile sed sensukcese la aferon de la sendependiĝo de Hungario. Neniu interesiĝis serioze pri tio. Jen grava leciono por la Hungaroj, lerninda unufoje por ĉiam.

Ankaŭ **Jozef Bem** fuĝis en Turkion, kaj finfine, konvertinte al la Islamo, iĝis „paŝa”, ĉefkomandanto de la fajrobregado de Istambulo.

Hungarion paralizis la (sepa) katastrofo sekvita de severa milita diktaturo aŭstria, poste de subprema reĝimo karakterizata per la decida rolo de la sekreta polico. La pasiva rezisto de la Hungaroj daŭris ĝis la jaro 1867.

Tiam, post la malvenko de la aŭstria armeo fare de la prusoj ĉe Königgrätz /Hradec Králové, estis subskribita historia kompromiso inter la Imperia kortego kaj la hungara nacio. Tion lerte preparis kaj negociis advokato **Ferenc Deák**, la „saĝulo de la patrujo”. **Francisko Jozefo la 1-a** iĝis kronita per la Sankta Krono de Hungario. Tio signifis la naskiĝon (sufiĉe malfruan) de la dualisma Aŭstria-Hungara Monarkio.

La industriigo kaj modernigo povis rekomenciĝi. Sed la jaroj 1848-1867 kaj la plimulto de la politikaj elmigrintoj estis definitive perditaj. Grafo **István Széchenyi**, malesperinte, mortpafis sin en la jaro 1860.

Grandeco kaj mizero de la (nur) dualisma Monarkio

La Aŭstria-Hungara Monarkio estis relative granda potenco en Mezeŭropo. Grandpaŝe progresis la industriigo kaj konstruado. Oni intencis krei el Budapeŝto duan Vienon.

La plej grava, kun-naskiĝinta problemo estis, ke konsiderinda parto de ĝia loĝantaro konsistis el slavaj popoloj: ĉeĥoj, poloj, slovakoj, ukrainanoj kaj rutenoj, slovenoj, kroatoj, serboj ktp., kaj el rumanoj. Do indus transformi ĝin je federacia ŝtato, almenaŭ trialisa. Tion urĝis precipe la ĉeĥoj kaj la kroatoj. Bedaŭrinde la neflekseblaj hungaraj naciistoj obstine kontraŭis tion. Ektiktakis la eksplodigilo de la etnaj konfliktoj.

La malboniĝon de interesnaj rilatoj pli akcelis la pompa celebrado de la miljariĝo de Hungario en 1896, kiu iritis la naciajn minoritatojn, incitatajn ankaŭ per la panslavisma movado apogita de Moskvo.

Milito kaj paco – dufoje perditaj

Francisko Jozefo la 1-a forpasis en 1916. Du sinsekvaj kronprincoj mortis jam pli frue (**Rudolfo** kaj **Francisko Ferdinando**). Do sekvis lin sur la trono **Karlo la 4-a**.

La unua modmilito finiĝis per kolapso de la Aŭstria-Hungara Monarkio en 1918. La (burĝa) Hungara popolrespubliko proklamita de grafo **Mihály Károlyi** ekzistis nur kvin monatojn. Ĝin sekvis la (komunisma) Konsilia Respubliko de **Béla Kun** en marto 1919, kiu daŭris nur 133 tagojn.

La Hungara Regno estis restituita, sed sen reĝo: **Karlo la 4-a**, la lasta Imperiestro, estis forpelita per milita forto el Hungario. Li baldaŭ mortis sur la insulo Madeira. (Poste papo **Johano Paŭlo la 2-a** deklaris lin „beato“.) Regis la landon (jam sen-maran) admiralo **Miklós Horthy**, kiel gubernatoro.

Per la packontrakto subskribita en la palaco **Trianon** de Versailles la 4-an de junio 1920, Hungario perdis du trionojn de sia teritorio favore al Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio (ambaŭ freŝe kreitaj), al la pligrandigita Rumanio, kaj eĉ al la Aŭstria Respubliko. El la 325 mil kilometroj kvadrataj restis nur 94 mil. Hungario perdis ankaŭ grandan parton de sia loĝantaro, la aliron al Adriatiko, kaj preskaŭ ĉiujn mineralajn riĉaĵojn. Tre konsiderinda parto, **unu triono de la Hungaroj ektroviĝis ekster sia patrujo, iĝinte etnaj minoritatoj en la najbaraj ŝtatoj supre elnombritaj.**

Tiu ĉi (oka) katastrofo produktis totalan frustriĝon.

Ne estas do mirinde, ke disvolviĝis forta movado de iredentismo en la landeto restinta Hungario. La itala faŝismo de **Benito Mussolini** kaj la germana naziismo de **Adolf Hitler** lerte profitis el tio. Per la t.n. Vienaj Arbitraĵoj (1938, 1940) Hungario re-ricevis parton de la iama Norda Hungario de Ĉeĥoslovakio kaj la nordan parton de Transilvanio kun Sikullando de Rumanio. La hungara armeo en 1939 marŝis antaŭen al la Karpatoj kaj re-establis la Hungaran-Polan landlimon. Tio ebligis al multe da Poloj eskapi la kunordigitan germanan-sovetan ofenzivon.

En 1941 Hungario milite reokupis de la (unua) Jugoslavio parton de la iama Suda Hungario, malgraŭ la persona opozicio de la ĉefministro, grafo

Pál Teleki. Vidante, ke sia kontraŭstaro estas senrezulta, li mortpafis sin. Hungario eniris la duan mondmiliton ĉe la flanko de la aksopotencoj. Tio puŝis la landon al plua katastrofo.

La armeo preskaŭ neniigita, la ĉefurbo duone detruita, la okupintaj Germanoj forpelitaj, sed la liberigintaj Rusoj restantaj por nedeterminita tempo, la nova, demokratia Hungara Respubliko devis rekomenci ĉion el nulo.

Jen la naŭa krizo: la packontrakto de Parizo (februaro 1947) restituis la landlimojn difinitajn en Trianon.

Rezultis grava perdo de loĝantaro per elmigrado (parte devigita). Tio aldoniĝis al la jam sen tio terura nombro de viktimoj de la milito mem kaj de tiuj (ne nur Judoj) mortintaj en la naziaj koncentrejoj.

Sub la ruĝa stelo, en la ombro de la fera kurteno

En 1948, sub la protekto de la Soveta Armeo, la Hungara Komunista Partio kaptis la povon. Naskiĝis la Hungara Popolrespubliko, estrata de Mátyás Rákosi. Ĉiu opozicio al la komunisma reĝimo iĝis subpremita kaj likvidita, unu post la alia. La fifama fera kurteno hermetike fermis la landlimojn kun Aŭstrio kaj Jugoslavio. La persekuton de la eklezioj karakterizis falsaj, konceptitaj procesoj: tiu de kardinalo József Mindszenty en 1948-49, tiuj de la ĉefepiskopo de Kalocsa, József Grósz kaj de la luterana episkopo Lajos Ordas en 1951, kaj multaj aliaj ĝis 1965 (kontraŭ la jezuitoj). Jen simbolo tre signifa ago: en Budapeŝto la preĝejo Regnum Marianum iĝis simple eksplodigita.

Oni eĉ projektis, ke Hungario fariĝu unu de la respublikoj de Sovetunio. Bonŝance tiu ideo estis forlasita post la morto de **Stalino** la 5^{an} de marto 1953. Hungario ja estis membro-ŝtato de KEI (Konsilio de Ekonomia Interhelpo) kaj de la Varsovia Pakto de la soveta bloko.

La teroro ĉiam pli netolerebla de la ŝtata sekureco (internejoj kaj koncentrejoj, misteraj malaperoj de uloj), la totala subpremo de ĉiu ne-komunista kultura manifestado, la perforta disvastigo de la stalina dialektika materialismo kaj de la tiel-nomata proletara internaciismo, la ĉeesto de multenombraj sovetaĵoj soldatoj en la lando, la neebleco vojaĝi kaj komuniki kun la Okcidento ktp. paŝon post paŝo estigis pasivan reziston. Tio iĝis publika kaj aktiva en 1956 (laŭ la ekzemplo de la Poloj), ĉefe inter la universitataj gejunuloj.

La revolucion de la 23^a de oktobro 1956 brutale subpremis la freŝaj taĉmentoj de la soveta Ruĝa armeo (kiuj cetere originale estis destinitaj por interveni ĉe la kanalo de Suez) la 4^{an} de novembro. Pli ol 200 mil homoj, plejparte junaj, instruitaj kaj aktivaj, fuĝis el la lando. Notindas, ke la perdo estis multe pli granda, kaj absolute kaj relative, ol tiu okazinta post 1849.

Jen la deka krizo de Hungario je vivo aŭ morto.

La reprezalioj ordonitaj kaj ekzekutitaj de la pro-soveta registaro de **János Kádár** estis tre severaj. Eĉ la ĉefministro de la revolucio, **Imre Nagy**, iĝis ekzekutita, kvankam li estis fidela komunisto kaj serĉis azilon en la budapeŝta ambasadejo de Jugoslavio.

Tamen la subpremo paŝon post paŝo malfortiĝis (amnestio en 1963). Ekde 1968 (endonduko de la „nova ekonomia mekanismo”), post la „Praga printempo” (brutale subpremita en aŭgusto), la reĝimo de **Kádár** entreprenis vicon da paŝoj sur la vojo de politika liberaligo. Kardinalo **Mindszenty** pasinta dek kvin jarojn (!) en la budapeŝta ambasadejo de Usono, ricevis permeson forlasi la landon (direkte al Vieno). Tiutempe Hungario sendube estis „la plej gaja barako de la kampo” (soveta). Tiu procezo finfine produktis politikajn ŝanĝojn pli radikalajn en 1989, inkluzive la forigon de la fera kurteno.

Printempe de 1991 la libera voĉdonado rezultis je venko de la opozicio, nome de la Hungara Demokratia Forumo (MDF). **József Antall** iĝis la ĉefministro de koalicia registaro de pluraj ne-komunistaj partioj.

La dato de tiu elekto estis la 25^a de marto 1990: **la festo de la Anonco/Anunciacio.**

La sovetaj soldatoj forlasis Hungarion en junio de la sekvinta jaro, post 46 jaroj kaj 2 monatoj. Ĉiuj sonorilegoj de la lando sonis dum unu horo.

Tiujare Sovetunio iĝis deklarita dissolvita. Tio okazis la 8^{an} de decembro 1991: **la festo de la Senmakula Koncipiĝo.**

La Granda Damo do finfine ne forgesis pri siaj „povraj Hungaroj”.

(Re)aliĝi al Eŭropo intertempe sekularizita.

Esperoj kaj dilemoj de la estonto

Unuflanke: demokratio, parlamentismo, pluralismo, privatigo, redono de la konfiskitaj havaĵoj, respektive sendamaĝigo, restituo de la rajtoj de la homo kaj de la eklezioj.

Aliflanke: akcelita inflacio, penetro de mult-naciaj entreprenoj, malaltiĝo de la vivo-nivelo, kresko de la senlaboreco, de la deficino en la ŝtata buĝeto kaj de ĉiaspecaj impostoj, malboniĝo de la sekureco, plifortiĝo de krimagado (bone organizita kaj internaciiginta), komerco kaj konsumo de drogoj (narkotiloj), seninteresiĝo pri la tradiciaj religioj, plinombriĝo de sektoj, malkresko de la financado de la edukado, de la scienca esplorado kaj de la publika sano.

Tiuj estas la ĉefaj problemoj kaj defioj, pri kiuj devas okupiĝi dum siaj kvar jaroj ĉiu registaro, ĉu „dekstra” (nacia-konservativa, 1990, 1998), ĉu „maldekstra” (socialista-liberala, 1994, 2002, 2006).

Hungario klopodis reguligi siajn rilatojn kun la najbaraj landoj, kiel eble plej amike, por forigi la enradikiĝintajn rankorojn. Tri bazaj traktatoj estas jam subskribitaj: kun Ukrainio, Slovakio kaj Ru-manio.

Hungario festis sian mil-cent-jaran jubileon en 1996, iĝis NATO-lando en marto de 1999, kaj iĝis membroŝtato de la Eŭropa Unio en majo 2004.

□

Jen kial Hungario estas neebbla lando. Laŭ ĉiu rezonado pure homa, ĝi devintus esti jam delonge malaperinta. Tamen, malgraŭ ĉiuj peripetioj, ĝi ankoraŭ ekzistas, akceptante kun kuraĝo kaj konfido la defiojn de la estonto.

Kompletigita 2008-01-19.

Intervjuo kun

MUDr. Koza – hemato-onkologo, kiu mortis je la 28-a de junio.2012 en siaj 57jaroj baldaŭ post tiu ĉi intervjuo.

http://zpravy.idnes.cz/rozhovor-s-lekarem-vladimirem-kozou-dva-domaci.aspx?c=A120607_105332_domaci_js



Hematologon D-ron Vladimír Koza-n konas tuta Eŭropo. Ĉeĥaj malsanuloj kun diagnozo leukemio dankas al li pro sia pluvivo. Antaŭ dudek unu jaroj li efektivigis la unuan grefton de osta medolo kaj fondis registrobankon de donantoj de osta medolo.

Li estis ĉefkuracisto en hematoonkologio en fakultata kliniko en Pilzeno (Plzeň). En la jaro 1991 li unuan fojon realigis greftadon de osta medolo en nia lando, kie ĝis tiu tempo mortadis homoj, kiuj malsaniĝis pro leukemio kaj post kvar jaroj de kuracado mortadis. Li ankaŭ fondis liston de donacontoj de osta medolo. Lia donacregistro apartenas inter la plej bonaj en

la mondo. Li faris centojn da operacioj jare kaj miloj da homoj resaniĝis. Ankaŭ pro tio D-ro Koza estiĝis prezidento de Eŭropa asocio por greftado de osta medolo.

Li mem spertis, kio por malsanulo signifas limo de medicino, dum grava malsano ĉe fino de lia propra vivo. Tial liaj opinioj kaj proklamoj pri politiko kaj konduto de kuracistoj kaj pri vivo ĝenerale estas ege malfermitaj kaj ekzaktaj.

Kio estas sukceso en vivo de kuracisto?

Estas du malsamaj aferoj: **havi sukceson** kaj esti bona kuracisto. La sukceso estas resaniĝintoj kaj tio, ke vi estas milimetre pli lerta ol aliaj. **Esti bona kuracisto estas pli malfacila.** La kuracisto devas esti persono – ĉu en malgranda montara vilaĝo, ĉu en grava kliniko. Ĉe tiu homo malsanulo jam ĉe la unua alveno sentas, ke venis iu, al kiu li povas kredi. Por tio devas la kuracisto posedi en si mem ion, kion li ne manifestas antaŭ malsanulo, sed devas havi ene – **humilecon**. Tre grandan, doloran memkritikecon, ĉar profesio de kuracisto, kiel unu el malmultaj, donas grandan povon super homoj en nomo de bono kaj tio estas grandega danĝero!

Diru tion pli detale

Mi donos ekzemplon: Mi vidas iri laŭ koridoro junan dudekokjaran kuraciston. El ĉambro venas sesdekjara viro en ĵupano kaj tre ĝentile demandas, ĉu la doktoro permesus al li foriri hejmen, ĉar li jam sentas sin bone. Sed tiu klare diras: „Nur morgaŭ!“, ĉar li opinias, ke tio estas bona por la paciento kaj ne demandas, kial la viro sopiras iri hejmen, ĉu li havas hejme hundon, kiu atendas lin. Tiu kuracisto ne plaĉas al mi. Temas nur ŝajne pri bagatelaĵo. Kiam tia kuracisto vivas per la sama maniero kaj neniu lin ĝustatempe haltos, li komencas pensi pri si, ke estas dio. Kaj tiaj estas ĉe ni multaj.

Do, ĉe kuracistoj validas – ju pli granda persono, des pli humila vivo?

Certe. Tio povas finiĝi per batalo, kiu estos PhDr., kiu eksidos en akademia senato... kaj al reciproka batalo.

Sed, kiam la kuracisto laboras, per maniero kiel vi diras, post iu tempo li povas suferi, ĉu pro sia propra sano aŭ pro disfalo de familio?

Medicino estas duone scienco kaj duone arto. Tion ne ĉiu kapablas harmonii. Oni devas havi talenton. La scienco estas tio, kion vi lernis: kiam vi donos injekton, okazos tio. Sed vi havas konkretan pacienton, unu estas kardiako kaj havas sesdek jarojn, alia estas virino, kiu ankoraŭ ne naskis bebon. Kaj tiel el diagnozo kaj pura scienco estiĝas arto. Malsano estas alia merkrede, alia vendrede kaj la talento de la kuracisto devas trovi momenton: NUN faru tion, ĝuste nun. Eble vi ne scias kial, sed ĝi funkcias.

Vi estas en situacio, kiam oni bilancas. Ĉu vi bedaŭras ion, kion via laboro forprenis de vi? En propra vivo, en sano?

Jes, en ambaŭ aferoj la laboro influis. Logike. En tia laboro ne temas pri okhora laboro ĉe fabrika ĉeno. Mi multe pri tio nun cerbumis. Kaj mi pensas, ke mi komprenas. Mia sento ne estas forta, se en kazo, ke la vivon oni povas ripeti, mi farus ion tute alie. Ekzemple hieraŭ okazis unika afero. Oni aranĝis golfan turniron kaj onidire oni ion donacos al nia asocio. Do mi venis tien. Mi vidis grupon da kleraj, riĉaj homoj, sur teraso staris ĉarumoj kun bastonoj, kiuj tute ne apartenis en tiun belan pejzaĝon, la kelnero antaŭ ni manipulis en aero kun glasoj. Tio estis tute alia mondo. Mi sentis min kiel en filmo de Fellini. Tie mi fiksis mian opinion, ke mi certe ne elektus alian vivon, ol kiun mi vivis. La grupo de tiuj homoj nenion valoran posedis. Ili estas kleraj, bonfartaj, ludas teatron de grandaj amikoj, sed ene estas vakaj. Tiel vivi mi ne volus.

Nek mono allogis vin?

Ho, kuracistoj perlaboras pli ol ili konfesas. Nun en sanzorgo oni akiras bonajn salajrojn. Mi ne sentis min inter tiu grupo malriĉe. Ankaŭ mi povas aĉeti por mi stultan brakhorloĝon je du mil. Sed kial? Mi hontus. Mi povas imagi, kiom da alia belo kaj bono oni povas akiri.

Mi estis invitita en lernejon, kie studentoj aŭkciis bildojn, kiujn ili desegnis. Nenia vera arto, sed ne temis pri bildoj, la lernejo vivtenas sin el aŭkcio kaj mi lasis tie 30 milojn je du bildoj. Kaj tiu homo, kiu gvidis la golfan turniron donis al ni unu mil, kion diri plu?

Ne nur lukso, eĉ povo estas alloga...

Tion mi vidas ĉiun jaron dum renkontiĝo en Rusujo kun kamarado Gorbaĉov. Mi estas invitata tien danke al mia posteno en eŭropa asocio por grefto de osta medolo. La renkontiĝo alportis al mi nur disreŭiĝon. Li estas figuro, kiu ne konscias eĉ sian atingopovon. Li venas kun grupo de gardantoj kaj policianoj al kiuj li kondutas kiel fiera moŝto, sed kiam li skribis al Putin, okaze de nia asocio, kondutis kiel subulo antaŭ superano. Kia servileco! Gorbaĉov estas por mi simple vaka vazo, kiun elportis historia ondo.

Vi mencias eble eksan hejtmano Rath, kiu iras kun pistolo?

Krom alia. La mondon ŝanĝas milionoj de afablecoj, ne politikaj reformoj.

Antaŭ 21 jaroj vi fondis Nacian registron de donantoj de osta medolo nur per unu subskribo...

Hodiaŭ tio ne eblas. Pro burokratio kaj gardo de kvalito kaj sekuro de datenoj. Mi ne komprenas, se parlamenta komisiono demandas BIS (Sekureca informa servo), kiu faris telefonan subauskultadon de sinjoroj Bém kaj Janoušek, kaj tiu ĉi sekreta servo dum du monatoj ne kapablas respondi. Mi, kiel ordinara kuracisto, tute ne komprenas la aferon. En tiu kazo ni en nia registro havas pli bonan sekurilon ol BIS. En nia sistemo, kie

estas tiklaj datenoj de malsanuloj kaj donacintoj ĉiam restas spuro post ĉiu, kiu manipulis registron, inkluzive de informo pri kio tiu ulo manipulis. Se iu penetras en registron el ekstero, ni en dek minutoj pri tio ekscius.

Nu, nun oni preparas Ĝeneralan registrojn de malsanuloj, kie estos miloj da tiklaj informoj pri malsanoj de homo, pri lia familio, posedaĵo...Kaj akiri informojn povos fakte ĉiu, kiu petos.

Tio ne povos bone funkcii. Informoj pri vi eble iam flosos en rivereto. Jes, ĉar la aferon posedos la ŝtato.

La ministerio asertas, ke neniu misuzos....

Sed tiaj datenoj estas tre fragilaj! Mi, kiam mi malfermas dokumenton pri la paciento, mi legas lian vivon. Klare mi vidas kiam li havis personajn problemojn, se li divorcis, kiam li perdis laborpostenon...kiam mi imagus, ke mi havas al tia registro ŝlosilon, dum kvin minutoj mi ekkonus pri iu ajn ĉion.

Nu, tio estas parto de reformoj. Pli ekzakte de pluaj el provoj. Kion vi opinias pri „sanzorgaj reformoj“? Ĉu ni direktas ĝuste? *Kio estas por vi aflikto?*

En la vivo oni elektas ĉiam el du konceptoj: inter libereco kaj akcepto de prizorgado. Kaj kiam la homo deziras esti senrespondeca, por ke iu alia pri li zorgu, do, li pagas por tio per libereco. Eĉ per sklaveco. Ĉar tiuj, kiuj pri vi zorgas, manipulas per vi. Ili scias ĉion pri vi, ili legas tion pri vi. Ili ne laboras por via bonfarto, tio estas miso. Mi ne diras tion malbone, la „homo sapiens“ estas tia esence.

Libereco do signifas respondecon?

Jes, tio estas malfacilaĵo. Pli facile estas pasi dimanĉon en supermarkato kaj kredi ke Tomáš Julínek aŭ Leoš Heger (ministroj de sanzorgo) ĉion aranĝos. Mi estus pli duba pri tiuj saĝuloj, kiuj al vi el via dekstra poŝo la monon elsuĉos kaj en la maldekstran onidire redonos. Oni ŝate aŭskultas ĉiujn plibonigantojn de la mondo kaj heroldojn de plibonaj venontaj tagoj, por ke la homo ne devus zorgi. Sed iu vere devas realigi la reformon. Sed tiuj „zorgantoj“ pri bonfarto de homoj ne ŝanĝos la mondon. La mondon povas ŝanĝi nur homoj, kiuj bakas bulkojn kaj matene venas al butikoj instruistino, ŝi envenas klason en bona humoro kaj anstataŭ riproĉoj, laŭdas la bubon. Milionoj da tiaj etaj aferoj ŝanĝadas la mondon. La mondon ŝanĝas tiuj, kiuj venas donaci ostan medolom kaj tiel redonas al iu nekonatulo vivon kaj lanĉas ĉenon de pluaj homaj okazaĵoj. Tiaj aferoj fiksas mondon por bono, ne reformoj.

Kiaj „etaĵoj“ ĝojigas vin? Kiam vi sentas vin feliĉa?

Tio estas sekundoj. Ekzemple kiam mi renkontas fraŭlinon kun dorsosaketo, kiu alvojaĝis per trajno el Beskydy (montaro en nordorienta parto de respubliko) al Pilzeno kaj demandas, kie estas hematookologio kaj fiere deklaras: mi estas donaconto...Ŝi venis pro iu alia, tute fremda, por ke oni pikados ŝin, ekdormigos ŝin per narkotiko, kaj kun doloro ŝi revenos hejmen kaj la salajro estas: dankon! Unu foje jare ni invitas donacintojn por kunveno kaj tio estas pluaj momentoj, kiam mi sentas min feliĉa. Dum tiu ĉi okazo ni konatigas paron – donacinto kaj savato. Ĉi jare venis juna fraŭlino. Familio de donacintino havis kune du infanojn en la sama aĝo. Mi prezentis unu al aliaj, mi foriris en angulon kaj nur rigardis. Tiel rolas vivo mem. Mi ne volas esti fiera, sed en tiaj momentoj mi ne rifuzas...

Ĉu estas okazaĵoj, kiujn vi ĉiam memoros?

Fraŭlino Karlička. Ŝi estis dudekjara, bela kabino, ŝi tre multe timis operacion. Mi pasis kun ŝi horojn, por trovi ŝian psikan problemon, kial ŝi ne volas kuraci sin, kaj mi klarigis al ŝi, kial estas necese kuraci. Mi ne sukcesadis. Mi dum kvar jaroj klopodis. Nur poste kiam ŝi jam sentis sin tre malbone, ŝi komprenis, ke mi pravas kaj ŝi konsentis. Hodiaŭ ŝi estas denove bela knabino kaj ĉiun jaron en datreveno de operacio ŝi portas al mi kravatton. Kaj ĝin mi surmetas okaze de kunveno de donacintoj.

Ĉe ni antaŭ la jaro 1989 la grefto de osta medolo oni ne realigis, en esterlando jes. Vi povis doni al la malsanulon neniun esperon....Kiel vi tion sentis?

Tiuj homoj simple devis morti...La lastajn mi memoras ĉiujn. Ekzemple du fraŭlojn, kiuj servis en armeo kaj estis venigitaj. Sen grefto atendis ilin nur kvar jarojn de vivo inkluzive de duono da jaro de mortado. Kion diri al la homo, kiu mortas kaj vi ne scias kiel al li helpi? Kiel vi fartas, Zdendo? Aŭ Vašek. Li havis du fratojn, konvenajn donacontojn, li ne devis morti. Tri tagojn antaŭ la fino li donis al mi biblion. Mi posedas ĝin ĝis nun. Post li knabino – Jana. Sed ĉar Vašek konvinkis min, ke helpo estas ebla, ni en primitivaj kondiĉoj la grefton de osta medolo realigis. Kaj Jana en urbo Rokycany vivas ĝis nun.

Sinjoro doktoro, kiujn planojn vi nun havas?

Mi transdonas mian laboron al pli junaj. Medicino estas stranga, neniun kuracisto povas ĝin forlasi. Mi konas profesorojn, kiuj misiras al sian ĉambreon, urinon ne tenas, sed konstante vagadas en koridoroj de hospitalo, jes, terura afero, mallgaja rigardo. Ja kiom da jaroj aŭ monatoj la providenco permesos al homo, antaŭ ol venos senileco? Pli bone kun honoro foriri. Kaj provi plenumi siajn revojn. Mia problemoj ne estas kion fari, sed el tiuj revoj elekti unu-du-tri.

Tradukis J. Drahotová, 2012.

La letero de la Ĉefo Seattle,

José de Paiva Netto

Artikolo aperinta en centoj da gazetoj, revuoj kaj ttt-ejoj en Brazilo kaj en la mondo.

Responde al petoj de legantoj, kiuj nin akompanas en diversaj ĵurnaloj en Brazilo, jen mi prezentas tekston, kiun mi transkribis en mian serion da artikoloj, publikigitaj en la ĵurnalo Folha de S. Paulo, en la jaro 1986. Mi scias, ke multaj amikoj — el la medio de radio, amaskomunikiloj, televido kaj defendantoj de la Patrino Naturo — ke ili ŝatus havi la faman leteron de Ĉefo Seattle (1787-1866).

Mi ricevis, en 1986, el la manoj de ĵurnalisto Walter Periotto, tiama ambasadoro de LBV en Usono, tiun paĝon, pri kiu multaj personoj jam aŭdis, sed kiun ili ne havis okazon ekkoni. Hodiaŭ ni prezentas tiun dokumenton al ĉies pripenso.

José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radikronikisto kaj verkisto.
direktoro-prezidanto de LBV- Legio de Bona Volo.

„Kiu estas la mastro de la ĉielo, de la brilo de la akvoj?”

(Traduko de la teksto, konsiderata aŭtenta, de la letero de la Ĉefo Seattle kiu, en 1855, respondis al la propono de Usono aĉeti la indiĝenan landon. Ĉi tiu teksto devenas de “UNEP” — Programo de Unuiĝintaj Nacioj por la Medio.)

„Kiel vi povas aĉeti aŭ vendi la ĉielon, la grundan duonvarmecon? Tia ideo ne havas sencon por ni.

„Se ni ne posedas la freŝecon de la aero kaj la brilon de la akvo, kiel

vi povos voli ilin aĉeti?

„Ĉiu ajn parto de ĉi tiu lando estas sankta al mia popolo. Ĉiu ajn pinfolio, ĉiu ajn marbordo, la nebulo de la senlumaj boskoj, la brila kaj zumanta insekto, ĉio estas sankta en la memoro kaj sperto de mia popolo. La suko kiu fluas interne de la arboj kunportas kun si la memorojn de la ruĝhaŭta homo.

„La mortintaj blankuloj forgesas sian naskiĝlandon, kiam ili postmorte vagas inter la steloj. Niaj mortintoj neniam forgesas ĉi tiun mirindan landon, ĉar ĝi estas la patrino de l' ruĝhaŭtulo. Ni estas parto de la grundo kaj ĝi estas parto de ni. La bonodoraj floroj estas niaj fratinoj; la damacervoj, la ĉevaloj, la majesta aglo, ĉiuj estas niaj fratoj. La rokpintoj, la boskaj bonodoroj, la vivpova energio de la poneo kaj la Homo, ĉio apartenas al ununura familio.

„Tiel, kiam la Granda Ĉefo en Vaŝingtono sciigas nin pri sia volo aĉeti niajn grundojn, li petas tro multe de ni. La Granda Ĉefo sciigas nin, ke li rezervos lokon kie eblus al ni vivi komforte, per niaj propraj rimedoj. Li estos nia patro kaj ni estos liaj filoj. Se la afero estas tia, ni ekzamenos lian proponon pri la aĉeto de nia grundo. Sed tiu aĉeto ne estos facila, tial ke ĉi tiu grundo estas sankta por ni.

„La pura akvo, kiu fluas en riveretoj kaj riveroj, ne estas nur akvo, sed la sango de niaj prauloj. Se ni vendos al vi la grundon, vi rememoru nepre ke ĝi estas sankta, kaj vi devas informi viajn filojn ke ĝi estas sankta kaj ke ĉia spektra rebrilo sur la surfacoj de la lagoj rememorigas eventojn kaj periodojn de la vivo de mia popolo. La plaŭdado de la akvoj estas la voĉo de niaj antaŭuloj. La riveroj estas niaj fratoj; ili sensoifigas nin. Ili portas niajn kanuojn kaj nutras niajn infanojn. Se ni vendos nian landon al vi, vi devas memori kaj instrui viajn infanojn pri tio, ke la riveroj estas niaj fratoj kaj ankaŭ viaj fratoj, kaj ekde tiam vi sentu por la riveroj la saman specon de

amo kian vi sentas por frato.

„Ni scias ke la blankhaŭta homo ne komprenas nian estmanieron. Al li, landpeco ne distingiĝas el iu alia, ĉar li estas kvazaŭ fremdulo kiu venas nokte kaj ŝtelas el la grundo ĉion, kion li bezonas. La tero ne estas lia frato sed lia malamiko; post ol li submetas ĝin al si, kiu ĝin konkeras, li foriras, serĉante alian lokon. Li postlasas la tombon de siaj gepatroj, kaj tio ne gravas por li. Li kaptas la landfilojn, kaj tio ne gravas por li. La gepatran tombon kaj la gefilan heredaĵon, li forgesas. Li traktas sian patriron, la grundon, kaj sian fraton, la ĉielon, kvazaŭ aferojn aĉetotajn aŭ ŝtelotajn, kvazaŭ ili estus ŝaffeloj aŭ senvaloraj brilaj globetoj. Lia apetito elĉerpos la grundon, kaj lasos post si nur dezertojn.

„Tion mi ne komprenas. Nia vivmaniero estas tute alia ol la via. La panoramo de viaj urboj doloras la okulojn de ruĝhaŭtulo. Eble okazas tio ĉar li estas sovaĝulo, kaj tial li nenion povas kompreni.

„En la urboj de la blankhaŭtuloj ekzistas neniu loko, kie regas silento kaj paco. Neniu loko, kie aŭdiĝas la bruetado de folioj en printempo, la zumado de insektaj flugiloj. Eble ĉar mi estas sovaĝulo, mi ne povas kompreni tion.

„La bruo taŭgas nur por insulti la orelojn. Kia vivo estas tia kie la homo ne povas aŭdi la pepadon izolan de la noktuo aŭ la kvakadon de la ranoj ĉe la bordo de marĉoj nokte? La indiĝeno preferas la mildan susuron de la vento tuŝanta la surfacon de la laga akvo, aŭ la parfumon de la venteto purigita de la tagmeza pluvo aŭ sorbinta la parfumon de la pinfruktoj.

„La aero estas altvalora por la ruĝhaŭta homo, ĉar el ĝi ĉiuj sin nutras. La bestoj, la arboj, la homo, ĉiuj spiras la saman aeron. Blankhaŭta homo laŭŝajne ne interesiĝas pri la aero kiun li spiras. Kvazaŭ putranta kadavro, li estas indiferenta pri la haladzo. Sed se ni vendos al vi nian

landon, vi devos memori ke la aero estas altvalora por ni, kaj ke la aero blovas sian spiriton en ĉiajn ajn estaĵojn kiuj vivas per ĝi. La aero enspirita de niaj geavoj en iliaj unuaj infankrietoj estis la sama kiu ricevis el ili la lastan elspiron.

„Se ni vendos nian landon al vi, vi devos konservi ĝin aparte kiel sanktan, kiel lokon kien eĉ blankulo povos iri enspiri la venteton sorbintan la parfumon de la boskaj floroj.

„Tiel ni konsideros vian proponon por aĉeti nian grundon. Se ni decidus akcepti ĝin, mi postulos jenan kondiĉon: blankulo devos trakti la ĉi-tieajn bestojn, kvazaŭ ili estus liaj fratoj.

„Mi estas sovaĝulo kaj mi ne komprenas alie. Mi vidas milojn da bubaloj putriĝantaj sur kampoj, forlasitaj de la blankulo, kiu pafas el moviĝanta trajno. Mi estas sovaĝulo kaj mi ne komprenas kiel fumanta ferĉevalo povas esti pli grava ol bubalo, kiun ni ĉasas nur por konservi nin vivaj.

„Kio okazos al homo sen la bestoj? Se ĉiuj bestoj malaperus, la homo mortus pro spirita soleco. Ĉar kio okazos al la bestoj, tio povos atingi la homojn. Ĉio interrilatiĝas.

„Vi devas instrui al viaj filoj ke la tero sur kiu ili paŝas simbolas la cindrojn de niaj prauloj. Por ke ili respektu la teron, instruu al ili ke ĝi estas riĉa pro la vivo de ĉiuj estaĵoj el ĉiaj specoj. Instruu al ili tion, kion ni instruas al la niaj; ke la tero estas nia patrino. Kiam la homo kraĉas sur la teron, li kraĉas sur sin mem.

„Pri io ni estas certaj: la tero ne apartenas al la blankulo; la blankulo apartenas al la tero. Pri tio ni estas certaj. Ĉio rilatas inter si kiel la sango kiu unuigas familion. Ĉio interligiĝas.

„Kiu vundas la teron, tiu vundas ankaŭ la filojn de la tero. La homo ne teksas la teksaĵon de la vivo; male, li estas unu el ĝiaj fadenoj. Kion ajn li faras al tiu teksaĵo, tion li faras al si mem.

„Eĉ blanka homo, kiun Dio akompanas, kaj al kiu Li parolas kiel amiko, ne povas eviti tiun komunan destinon. Eble, malgraŭ ĉio, ni ĉiuj estas fratoj. Ni konstatos tion. Pri io ni scias — kion eble la blankulo iam malkovros: nia Dio estas la sama Dio. Vi povas pensi hodiaŭ ke nur vi Lin posedas, samkiel vi deziras posedi la landon, sed vi ne povas. Li estas Dio de la homo kaj Lia komparto estas la sama tiel por la blankhaŭtulo kiel por la ruĝhaŭtulo. Ĉi tiu lando estas amata de Li, kaj ofendi la landon estas insulti ĝian Kreinton. La blankuloj ankaŭ forpasos; eble pli frue ol ĉiuj aliaj gentoj. Infektu vian liton, kaj vi sufokiĝos iunokte pro viaj propraj ekskremento.

„Sed laŭ via vidpunkto, vi brilos alte, prilumataj per la forto de la Dio, kiu vin alportis al ĉi tiu lando, kaj kiu per ia speciala komplezo, donacis al vi la regadon super ĝi kaj super la ruĝhaŭtulo. Tiu destino estas mistera destino por ni, ĉar ni ne komprenas kio okazos en la tago, kiam la lasta bubalo estos mortigita, la sovaĝaj ĉevaloj estos dresitaj, la sekretaj anguloj de la arbaroj invaditaj de la ŝvita odoro de multaj viroj kaj la panoramo de brilaj montetoj blokita de parolantaj metalfadenoj. Kie estos la arbaro? Ĝi estos malaperinta. Kie estos la aglo? Ĝi estos malaperinta. Fino de l' vivado kaj komenco de l' postvivado.”

Respektinda ekzemplo

Kiom da saĝo kaj homamo en viro taksata kiel sovaĝa!...

Tiuj kvalitoj ne manku al la civilizitoj, kiam ili estos frenezigitaj de la blindeco pro superregado, je ia ajn prezo, super siaj similuloj.

La Patrino-Tero eble ne eltenos niajn petolaĵojn de simioj en vendejo de argilaĵoj.

***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵaneiro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵaneiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Pendolo en tempo

Doc.ThDr.MUDr.Mgr. Max Kaŝparŭ Ph.D.
MFDNES 18.2.2012, p.11.

Kio okazis al nia nuntempo ? Ĉu ni vere travivas gravan krizon? Kial homoj sentas kvazaŭ io rompiĝis kaj ili mem seniluziiĝis ? Kio nin atendas en la estonto? La tagĵurnalo MF DNES alportas serion, en kiu ĉefaj verkistoj priskribas, kiel ili vidas ŝanĝojn de la mondo. Tiu ĉi artikolo (aŭ eseo) devenas el vidpunkto de homo, kiu konas animon elprofunde. Max Kaŝparŭ, verkisto, psikiatro, esperantisto kaj aŭtoro de dudek libroj de eseoj, tradukitaj en polan, italan kaj francan lingvojn . . .

Ĉiu studento de medicino estas dekomence gvidata per sia profesoro, ke – estante kuracisto - ĉe ĉiu malsanulo li starigu du bazajn demandojn: KIAL kaj KIEL. Kial la homo havas problemojn? – gvidas al indiko de diagnozo. Kiel kuraci? – serĉi vojon al la resanigo.

Se estas nia socio malsana, kaj ĝi vere estas, ankaŭ ni ĉiuj starigu ambaŭ demandojn. Nur superaj altaj politikistoj ĝenerale interesiĝas pri aliaj aferoj, ol estas problemoj de plimulto da homoj. Tamen la opinioj estas diversaj. Estas tiuj, kiuj kulpigas komunismon, aliaj neoliberalismon aŭ hedonismon. El mia vidpunkto ne influas socion la magiaj –ismoj, sed tri gravaj malignaj malsanoj: perdo de honto, progreso de socio sen respekto de naturaj sociaj normoj kaj sekve sento de malespero.

Jen diagnozo.

„Vi vivas en lando, kie oni nenion sentas hontenda.“ Per tiuj vortoj konkludis studento el Azio sian unujaran restadon en nia respubliko. Ju pli mallonga des pli trafa estas lia konkludo. Li pravas. La honto malaperis. Iuj homoj eĉ la vorton ne tro komprenas. Infano ne hontas moki instruiston, viro ne hontas forlasi edzinon kaj infanojn pro amatino, gefiloj malhonorigas gepatrojn, ne estas honto vivi kiel parazito aŭ publike propagandi malbonon. Do, kial politikistoj, servutuloj de mafio, ne hontas mensogi, ŝteli kaj trompi?

Multe kulpas amaskomunikiloj, kiuj el banalaĵoj faras tragedion kaj el tragedio banalaĵon. Ni vivas en tempo, kiam ĉio estas renversita. Idealojn de la vivo al ni diktas per sia nenormala konduto diversaj spirite malriĉaj „celebritoj“. Ili nun estas modeloj anstataŭ saĝaj poetoj kaj edukportantaj person-uloj, kiujn la „moderna ĉeĥa unuigata eŭropano“ eĉ ne piedbate tuŝas.

El elsendoj de televido, kies tasko estus kultivi homan animon kaj fajnigi penson por beleco, vero kaj bono, ŝprucas plejparte sango, adrenalino, testosterono... Laŭ tiu fakto mi komprenas, kial oni uzas la vorton „televidadaj kana(j)loj“...

Ĉiam, kiam mi laboras kiel fakulo pri psikiatrio ĉe tribunalo, kiu traktas farojn de juna delikvento, mi havas tendencon kulpigi sistemon, kiu

regas en tiu ĉi lando, ĉar junaj homoj estas viktimoj de ĝi. Sed kiu interesiĝas pri tio? Politikistoj tute ne! Ili zorgas teni pri kiel sian povon kiel eble plej longe per iu ajn strategio kaj tiuj, kiuj embuskas kaj volas ilin alternigi, serĉas taktikon anstataŭ ilin. Tute sen tiu „eksmoda“ eco – honto.

Ordinaraj homoj en la lando turmentiĝas pro sentoj de maljusteco, sed la supermaŝino de politiko kaj komerco gaje veturas plu. Kaj kial ne? Promesoj, frazoj kaj larĝaj ridoj el afiŝoj por balotoj tre rapide forbrulas en tiu maŝino. Mi proponus ordoni infuzion de hontosento al ĉiu unuopulo kaj al elektitaj unuopuloj transplanti konsciencan. Sed ambaŭ manieroj estus malfacilaj, ĉar la injektilo jam ne trovas vejnojn pro malbonaj longtempaj kutimoj kaj ke ĉe politikistoj la haŭton oni ne povas penetri pro ilia “hipopotama haŭto”.

Anstataŭ hejmo – domaĉo

Se masonisto volis konstrui firman kaj bonan domon, li bezonis krom ŝtonoj kaj brikoj ankoraŭ morteron kaj pendoŝnuron. Morteron por fiksi ŝtonojn kaj brikojn; pendoŝnuron, por ke la muroj estu vertikalaj. La konstruistoj de moderna postnovembra socio komencis cetere uzi ekonomiajn ŝtonojn kaj jurajn brikojn, do novajn kaj novajn leĝojn kaj regulojn, sed absolute ne uzis morteron kaj ne strebis pri vertikaleco de la muroj. Ili metas brikon sur brikon sen mortero farita el humileco, malavaro, bonkoro, pacienco, virto, sobereco kaj kreiveco. Antaŭe oni nomis tiun fiksaĵojn sep ĉefaj virtoj. Pendoŝnuron, kiu sekvas naturan graviton, ili uzis nun kiel pendolon kaj fiere vibrigis la sanktan tabuon per moderna relativismo. Estas normale, ke ŝtonojn oni metas en fundamenton kaj la brikojn poste. Do leĝoj starus antaŭ merkato, sed ĉe la ĉefa projekto oni faras renverse. Ju pli akrajn dentojn havas la merkato, des pli la leĝoj estas sendentaj. Sen mortero, kaj pendolo en la mano, oni povas konstrui nur domaĉon. Nur tio koncerne diagnozon.

Kuracado.

Kiel? Ekzistas du solvoj. Aŭ domaĉon ruinigi, aŭ ĝustatempe forkuri. La unua ebleco signifas revolucion, la dua – elmigron. Se mi proponus revolucion, mi povus esti punita pro krima damaĝo de fremda objekto, ĉar mi timas, ke en nia lando ni posedas eĉ ne tiun domaĉon. Se mi elektus elmigron, ekstaras la demando: Kien? En alian eŭropan ŝtaton certe ne, ĉar en Eŭropo mastrumas la samaj arkitektoj, kiuj helpis al ni ĉe la rekonstruo de la domaĉo. Ili ankaŭ konstruadas sen mortero kaj pendoŝnuro. Eble oni povus eskapi en landon de tiu studento el Azio, en landon, kie ankoraŭ ne malaperis honto.

La tria malsano estas infekta sento de malespero. Ni ĉiuj jam iom post iom dronas en ĝi. Post kelkaj jaroj oni ĵetadas al ni savboaton (alegorio de balotado), sed baldaŭ ni vidas, ke ĝi estas truita. Frustrigon alternas depresio, aflikton alternas malpovo. Kaj tiu senpovo ligita kun senelireblo estas grave danĝera. Se ĝi daŭras tro longe, ĝi ŝanĝiĝas al agresemo. Kaj ĝi ĉi tie jam ekzistas. Inter lernejoj oni trovas progreson de agresemo.

Ni estu tamen sinceraj kaj ne plendu nur pri tiuj sur la pinto. Ankaŭ ni kulpas, kiam ni akceptis renversitan stilon de la vivo, kiu flustras al ni: „Vivu abunde en ekstero, malriĉe ene.“ Se nia nacio ne faros ŝanĝon kaj ni ne ekvivos abunde en nia interno kaj malriĉe en ekstero, ni ne havas ŝancon... Sekve eĉ mi mem ne havos ŝancon plu labori en mia konsultejo kaj restos al mi nur eblo eskapi inter miajn frenezulojn, malesperantulojn. Tio ne estos malkuraĝo kaj mi ne estos sola, similajn homojn mi trovos tie. Sen la interna ŝanĝo kaj sen pentofaro ni ĉiuj renkontiĝos tie ĉi!

Esperantigis J. Drahotová, Margit Turková, 2012.

El la libro „Bona Espero – idealo kaj realo“

Roman Dobrzynski

Por la dua jarkvindeko Bona Espero bezonas novajn kolibrojn laŭ jena dekalogo:

- 1.Ami la naturon en ĉiuj formoj, inkluzive de infanoj;
- 2.Posedi ian financon dependon por eviti la frustraciojn de monaĥeja vivo;
- 3.Havi emocian ekvilibron alvenante prefere kun kolibro de malsama sekso;
- 4.Ne havi kutimojn kiel fumado, alkoholo, drogo, pigreco, klaĉemo, envio, ktp.
- 5.Praktike koni kelkajn fakojn kiel: instruado, infana psikologio, administrado, agrikulturo, elektro-mekaniko, hidraŭliko, masonado, kuirado ktp. ktp.
- 6.Konante tiujn fakojn, kapabli kaj voli praktike fari ĉion, laŭeble...per nenio!
- 7.Ne esperi kaj fidi je la registaro, ĉar en regionoj kun malmultaj voĉdonantoj, ĉiuj registaroj estas forlasemaj;
- 8.Ne plendi se la labortago estas 24-hora, la semajno 7-taga kaj la salajro – ĉeko en la „Banko Dio-Pagos-Vin“;
- 9.Esti esperantisto, tio necese signifas flue paroli Esperanton (la lingvon oni lernas en tri monatoj), sed havi sintenon tutmondan kaj ekumenan;
- 10.Doni daŭre bonan ekzemplon!

Se kelkaj kolibroj, leginte ĉi tiun libron, sentas sin vokitaj, skribu al:

Bona Espero, Caixa Postal 37, Alto Paraiso de Goias, 73.770-000 Brazilo

bonaespero@terra.com.br

Ursula kaj Gieseppe Gratapaglia.

Adiaŭa

Peter Breems, Nederlando, 2010.

En Skokovy ni denove estas
nun jam ni lastan vesperon festas
Kiel rapide la tempo iras
pri tio ni ĉiam denove miras
Denove ni Esperanton studis
kaj kun la lingvo ni ankaŭ ludis
Kun la akuzativo denove estis luktoj
sed la progresoj fine estis fruktoj
Ato, ita, ote ofte nin ankoraŭ embarasas
sed la lingvaj problemoj ni nun postlasas
Oni aŭdis multe ĉeĥe krokodili
eĉ francoj povis inter si france babili
Kiel la unuopa nederlanda reprezentanto
nur eblis por mi la lingvo Esperanto
Dankon meritas niaj instruistinoj
en tiu ĉi fako evidente regas la virinoj

Bone estis renkontiĝi niajn gekonatojn
por renovigi la amikajn korrilatojn
Novajn vizaĝojn ni povis bonvenigi
kaj kontaktojn kun ili ligi.
Skokovy adiaŭ, ni morgaŭ diros
ĝis kiam ni denove tien reiros?

Sinceran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis, helpis, konsilis, kritikis ...
kaj se vi deziras publikigi viajn verkojn, vi povas tion realigi en sekvaj
Legafaĵoj


drahotova@esperanto.cz



ENHAVO

Kolektanto, A.Apollo el Estonio.....	3
Komuna lingvo, Apati Kovacs Bela.....	3
Edukado de edukisto, JoDo.....	5
Kiel batali kontraŭ timo, Blanka Hužerová.....	6
Brazila- ĉeĥa korespondado, Drahotová.....	7
Neforpelu vagantajn hundetojn, J.Rýznarová.....	8
Detranĉitaj floroj, Nevedko.....	9
Lokustoj en supo, Bruno Ferrari.....	10
Mara mevo „Pepeto“, Blanka Hužerová.....	12
Esperantisto, Apati Kovacs Bela.....	14
La nigra katino, Keyhan Sayadpour, سد تان.....	16
Fabloj el la libreto de Jiří Žáček.....	17
Hiacinto kaj Mohamedo, Dimitar Haĝiev, Heroldo...23	
Mireille afiŝis en interreto.....	24
Sendependaj kaj justaj tribunaloj.....	25
Vera demokrati-fantazio, Siv Burell.....	26

Pri raneto, Martin Thorenz.....	26
Du paseroj, Blanka Hužerová.....	28
Pri telefonado, Milan Vodička.....	29
Ĉeĥa geniulo Jara da Cimrman, Karel Votoček.....	31
Komenio, Martin Jan Vochoč.....	34
El la libro Reĝo Maĉjo la Unua, Janusz Korczak.....	36
Romanco pri Karolo la Kvara, Jan Neruda.....	37
Neebla lando, Endre Dudich.....	39
MUDr.Koza, hematologo kaj onkologo, intervjuo....	59
La letero de la Ĉefo de Seattle, José de Paiva Netto...	66
Pendolo en tempo, Max Kašparů.....	71
El la libro „Bona Espero – idealo kaj realo“ Roman Dobrzynski ...	74
Adiaŭa, Peter Breems, Nederlando.....	76



Překlady pořízené z mezinárodního jazyka ESPERANTO do češtiny, které vyšly knižně:

Evropou a Asií na kole a s esperantem – Lucien Peraire

Osm let na cestách po naší planetě – Maryvonne a Bruno Robineau

Člověk proti babylonu – René Centassi a Henri Masson

Maškaráda kolem smrti – Tivadar Soros

Robinsoni na Sibiři – Tivadar Soros

Knihy v elektronické formě dosažitelné na www.bezvydavatele.cz

Nebezpečný jazyk – Ulrich Lins	Němec
Život Andreo Cseha – Ed Borsboom	Nizozemec
Bona Espero – Roman Dobrzynski	Polák
Srdce se zelenou hvězdou – Julio Baghy	Maďar
Chromozomy vraha – Lorjak	Francouz
Novely – Tibor Sekelj	Chorvat
No, fakt paní, věřte mi! – Cezaro Rosetti	Ital
Zápisky z Íránu – Tereza Kapista	Srbka
Život a esperanto – Vladimir Samodaj	Rus